

1975 septembro

68-a jaro

n-ro 837 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

ke, kiel kutime, la tuta septembra numero de la revuo estas dediĉita al la ĉi-jara Universala Kongreso. Plurloke en la numero estas emfazita la harmonia etoso, kiu regis en la jubilea Kongreso, kaj, se ni refoje ĉi tie substrekas denove tiun etoson, bonvolu ne kompreni tion kiel troigon sed nur kiel klopodon proksimiĝi al la vera bildo de la movada ĉefaranĝo ĉi-jara. Kiam temas pri nia revuo, necesas konfesi, ke ni en Kopenhago renkontis plurajn homojn, kiuj klare diris, ke pluraj aferoj en la revuo ne plaĉas al ili (tiu sincereco plaĉis al ni), sed ni renkontis ankaŭ legantojn, kiuj ne tiom grumblis pri la revuo. Ĝenerale, oni volas pli da sukero, pli da mielo sur niaj paĝoj. Nu, se la movada abelujo en la estonteco liveros pli da mielo, ni ne insistos pri nepra amareco de niaj paĝoj.

Enhavo

- 141 La 60a Universala Kongreso de Esperanto: Kopenhago estis triumfo de la harmonia etoso (Victor Sadler)
- 142 Rezolucio de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio
- 143 La kongresa rezolucio pri la rolo de la individuo en la Esperanto-movado
- 144 La Solena Inaŭguro: Impona festo por la jubileo
- 145 Rezolucio de la Komitato de UEA al la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro
- 146 La dua parto de la Inaŭguro — la Malfermo: La festa laboraranĝo
- 147 La ĝeneralaj kunvenoj: Kun reliefa tempritrakto
- 148 Fakaj kunvenoj en Kopenhago: Cento da kunvenoj, La kongresa rezolucio okaze de la Internacia Jaro de la Virino
- 149 Raporto pri la Belartaj Konkursoj 1975: La jubilea 25a rikolto (Baldur Ragnarsson)
- 151 Internacia Somera Universitato: Vigla interesiĝo (G. Konisi), Foto-Konkurso
- 152 La Solena Fermo de la 60a UK: Kiel oni epitetos la 60an UK? , Novaj honoraj membroj de UEA
- 154 Teatraj vesperoj: Bonkvalita spektaklo (Michel Duc Goninaz), Vespero kun du artistoj (sm)
- 165 Dana Vespero: Triumfo de Jadwiga Gibczyńska (sm), Piankoncerto de Danielle Béguin: Valora aldono al la programo (D.G.H.)
- 156 Internacia Arta Vespero: De Skandinavio ĝis Sud-Ameriko
- 157 La Junulara Tago: Aparta Junulara Tago — ĉu konvena? (Brian Moon)
- 158 La 31a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Fredericia kaj interŝanĝoj (Klaus Schubert)
- 159 Kunsidoj de la Komitato de TEJO: Ĝis kiu grado KER restas TEJO?
- 160 Kongreseroj. . .

La kovrilo

Plian fojon Kopenhago kaj ĝia Marvirineto sur la kovrilo de nia revuo. Plian fojon, sed kun nova detalo — la impona bildo el la Solena Inaŭguro de la 60a Universala Kongreso. Ekzistas urboj kaj kongresoj pri kiuj oni bedaŭras, ke oni foje vizitis ilin, ke oni foje kongresis tie. Kopenhago definitive ne estas tia urbo, ĉar alie oni ne revenadus al ĝi. Ekzistas ankaŭ LKK-oj pri kiuj oni bedaŭras, ke oni foje kunlaboris kun ili. La kopenhaga LKK kun sia senkompara dediĉiteco al la afero definitive ne estas tia. Tiu malmultnombra poŝformata LKK havis pasintjare la necesan kuraĝon inviti la Kongreson kaj ĉi-jare montris tian diligentecon kaj fortegan volon sukcesi, ke la tuto ne povis alie finiĝi ol kun brila sukceso de la jubilea 60a Universala Kongreso de Esperanto.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford OX4 4AA, Britio; tel. (0865) 47408.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M.Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P.Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F.Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S.Świstak, ul. Raławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J.Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.



La Komitato de UEA: La harmonia etoso de la kopenhagaj kunsidoj trudiĝis kiel unu el la ĉeftraĵoj de la jubilea 60a UK.

LA 60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO:

Kopenhago estis triumfo de la harmonia etoso

LA 60a UNIVERSALA KONGRESO estis triumfo en multaj sencoj. Precipe — kaj tion emfazis en siaj pritaksoj plej diversaj kongresanoj — ĝi estis triumfo el la vidpunkto de sia etoso. Regis etoso de harmonio, de kunlaboro kaj komprenemo, kaj tion multfoje ekzempligis la kongresaj laborkunsidoj: la kunsidoj de la Komitato kaj Estraro de UEA. La laboraj organoj elektitaj en Hamburgo montriĝis kapablaj ne nur vigle debati sed ankaŭ foje kompromisi por atingi unuecan starpunkton. Tio ne signifas, ke la Komitato kaj Estraro fariĝis subite monolitoj: tute male, kiam temas pri homgrupoj tiel diversnaciaj, vasta spektro de opinioj kaj konvinkoj estas atendebla kaj eĉ neevitebla. Sed tiu diverseco estis rekonita kaj respektata, kaj — eble ĝuste pro tiuj voĉoj ekster la Asocio, kiuj prognozis kaj predikis displitiĝon de la Movado — estis tre sentebla la pozitiva **vol**o kunlabori en bona akordo.

Bonaj intencoj, tamen, ne ĉiam sufiĉas. En Kopenhago la Komitato funkciis nekutime efike — parte pro tiu spirito de unueco, certe, sed grandparte ankaŭ pro la teknika strukturo de la kunsidoj. Unu el la unuaj decidoj faritaj en Kopenhago estis la unuanima akcepto de procedura regularo, proponita de la prezidanto

kaj kelkloke amendita. Se tio ŝajnas al la leganto burokrata bagatelo, necesas tamen certigi lin, ke multaj malakordoj en la pasinteco fontis el miskomprenoj aŭ malkonsentoj pro tio, ke ne ekzistis komune akceptita, demokratia principaro ekzemple pri la rajto fari proponojn, pri la parolvico kaj similaj stumbligiloj. Estas aparte grave en organizaĵo, kies membroj devenas el malsamaj mondpartoj kun tre variaj parlamentaj kaj organizaj kutimoj, ke ekzistu reguloj kaj ke ĉiu sciu, kiaj estas liaj rajtoj kaj kiamaniere li povas uzi ilin.

Ankaŭ en alia senco la kopenhagaj kunsidoj impresis kuraĝige. Kiam post la hamburgaj elektoj la novaj gvidantoj devis fronti la financajn realaĵojn kaj samtempe kritike pesi la antaŭajn agad-liniojn, estis tute kompreneble, ke pasos ioma tempo, dum kiu oni plejparte nur diskutos, elektos el la ĝisnuna agado la konservindajn erojn, interŝanĝos ideojn pri la estonta agado kaj ĝenerale provos reorientiĝi. Kopenhago markis la finon de tiu periodo de ĉirkaŭpalpado. La ĝeneralaj gvidlinioj jam konturiĝis, ne nur sur papero sed ankaŭ en la mensoj de la komitatanoj, kaj ankaŭ tio kontribuis al la glata kunlaboro. Tio ne signifas, ke la tuta vasta strategio de la Movado estas jam definitive fiksita; tute male, la Estraro diskutis ĝuste pri la ideo

REZOLUCIO DE LA KOMITATO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

La komitato de UEA en siaj kunsidoj en Kopenhago dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975

KONSTATIS:

ke lastatempe aperis en pluraj naciaj ĵurnaloj artikoloj, en kiuj oni kontestas la politikan neŭtralecon de Universala Esperanto-Asocio,

DEKLARAS:

ke al tiuj diskonigoj kaj gravaj akuzoj mankas ĉia bazo de vero kaj ke ne ekzistas unu sola pruvo, kiu pravigus tiajn misprezentojn,
ke la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en la artikoloj 4 kaj 13 de ĝia statuto, ĉiam estis, kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigas la neŝanceleblan bazon de ĝia ekzistado,
ke la Asocio estas preta kunlabori kun ĉiuj fortoj strebantaj al unueca komuna celo.

REKOMENDAS:

ke la estraro kaj la redaktoro de la revuo *Esperanto* evitu diskutojn pri la longe diskutitaj faktoj kaj pri la personecoj de nunaj aŭ antaŭaj gvidantoj en la Movado,

PETAS:

ke tiu ĉi deklaro estu vastskale diskonigata per ĉiuj taŭgaj rimedoj de informado.

okazigi, eble en 1976, studkonferencon pri la estonteco de la Esperanto-movado, ĝiaj strategio kaj taktikoj antaŭ kaj post la ĝenerala enkonduko de la lingvo. Sed oni almenaŭ vidas sufiĉe klare, kien oni iras en, ni diru, la venontaj du-tri jaroj.

Unue oni iras al definitiva solvo de la financa problemaro. Dum la pasintaj 30 jaroj la nombro de individuaj membroj de UEA restis pli-malpli konstanta: meze ĉ. 6 700, kun fluktuoj de ne pli ol 15%. Aliflanke la kostoj — precipe salajroj — inflacie altiĝadis, kio kaŭzis altiĝadon de kotizoj, kio malhelpis kreskigi la membronombro. La solvo trovita estas duflanka, celanta drastan redukton de la elspezoj kaj laŭeble kreskigon de la enspezoj. La Volontula Servo de UEA — kiu jam ekfunkciis kaj pri kiu vi legos detalan raporton en unu el la venontaj numeroj — ĉerpas el la vasta rezervo de konstrua laboremo kaj sindono ekzistanta en la membraro por plenumi preskaŭ senkoste multon, kio pli frue devis esti salajrata. En Kopenhago estis decidite starigi centran registradon de volontulaj laborfortoj — kaj samtempe ankaŭ de laborbezonoj — por tia-

maniere plej efike utiligi la disponeblajn helpantojn: ĉu en la Centra Oficejo de UEA, ĉu ĉe landaj organizaĵoj, ĉu en kongresurboj, ĉu en landoj sen organizita movado, ĉu per hejma laboro. Tiu registrado jam komenciĝis.

Dank' al la ĝisnunaj atingoj de la Volontula Servo kaj dank' al ĝiaj bonaj perspektivoj, la Estraro povis prezenti al la Komitato ne nur pli favoran prognozon pri la rezulto de la nuna jaro 1975 sed ankaŭ ekvilibrantan buĝeton por 1976 — sen kotizaltigoj por la individuaj membroj.

La alia flanko de la ekvacio konsistas el la t.n. Financa Programo de la Esperanto-Movado, kiun la Komitato principe akceptis kaj kiu celas mobilizi la landajn kaj fakajn asociojn por ke, kune kun UEA mem, ili atingu novajn monfontojn por komunaj agadoj. Tiu monserĉa programo, kiu celos unuavice ekstermovadajn fontojn, estos tre zorge planita ĝis la plej malgrandaj detaloj por maksimumigi la ŝancojn de sukceso.

Oni ne bezonas esti profesia optimisto por kredi, ke per tia duflanka klingo estos eble tratanĉi la konatan cirkon de inflaciaj kotizaltigoj kaj tiel meti la fundamenton por solida kresko de la membronombro kaj, sekve, de la asocia potencialo.

Due oni iras direkte al movado, en kiu la ligoj inter la centraj organoj kaj la landaj kaj fakaj asocioj estas multe pli fortaj; kaj en kiu apartaj komisionoj transprenas grandan parton de la laborŝarĝo de la centraj organoj, tiel liberigante ilin por ilia propra rolo: gvidado kaj kunordigado.

La fortikigon de la ligoj kun landaj kaj fakaj asocioj montris la apartaj kunsidoj de respondeculoj de tiaj asocioj, sub gvido de la koncernaj estraranoj de UEA, en la 60a UK. Tiuj estraranoj, respektive d-ro W. Bornmann kaj prof. C. Støp-Bowitz, laboris aparte vigle dum la pasinta jaro. Rezulte, pliaj landaj asocioj petis aliĝon al UEA, unu faka asocio aliĝis (medicinistoj), du pliaj fakaj asocioj kontraktis kunlabori (filologoj kaj rotarianoj — la lasta dum la Kongreso mem) kaj samon faris unu neneŭtrala (bahaanoj), dum kontrakton petis ankaŭ la matematikista asocio. Prof. Støp-Bowitz persone partoprenis praktike ĉiujn unuopajn fakajn kunsidojn dum la Kongreso, kaj ambaŭ estraranoj prenis kiel sian taskon ne nur varti la ligojn kun jam ekzistantaj asocioj sed ankaŭ laboradi por la starigo de novaj asocioj, ĉu en landoj sen organizaĵo, ĉu sur fakaj kampoj ĝis nun neorganizitaj. La gravecon de tiuj pli proksimaj ligoj kun landaj kaj fakaj asocioj el vidpunkto de la nova Financa Programo ilustris la anonco, dum la UK mem, pri granda donaco (5 500,- gld.) de f-ino B. Salt por agado en skoltaj medioj. Memkompreneble, tiu agado estos planita en intima kunlaboro kun Skolta Esperanto-Ligo. Ankaŭ la disvolviĝo de la Volontula Servo larĝe dependos de la eblecoj efike utiligi volontulojn en (ali-)landaj kaj fakaj asocioj. La glata ruliĝo de la komitataj laboroj en Kopenhago multe ŝuldiĝis al la menciita principo de memstara laboro en komisionoj. Ekzemple, dank' al la intensa laboro de la Komisiono pri financo kaj administrado,



La Komitato de UEA en Kopenhago: Viglaj opiniinterŝanĝoj ne ĝenis harmonian funkciadon de la kunsidoj.

kiu plurfoje kunsidis dum la jaro, la Komitato povis en relative mallonga tempo aprobi la financojn de UEA por 1974, la buĝeton por 1976 kaj la kontojn de la Kongresoj en Beogrado kaj Hamburgo. Tiuj kongresaj kontoj montris profiton de 34 446,42 gld. (Beogrado) kaj malprofiton de 20,19 gld. (Hamburgo). Ĝi povis principe aprobi ankaŭ proponon pri simpligo de la membro-kategorioj ekde 1977. La ĉefaj ŝanĝoj estas la simpligo de membreco por gejunuloj, la sendependigo de la membreco en la Societo Zamenhof disde la UEA-membreco, kaj malaltigo de la kotizoj por membro kun jarlibro kaj por simpla abono de la revuo *Esperanto*. La ĉefaj celoj estas: simpligi la administradon kaj faciligi la vastigon de la sistemo de "asociaj abonoj" laŭ la ekzemplo de Belga Esperanto-Federacio. Ankaŭ persono, kiu ricevas la revuon kiel "asocia abonanto" kaj restas individua membro de UEA kun jarlibro, estonte rajtos esti komitatano aŭ delegito.

Ankaŭ la estonteco de CED — post multaj diskutoj kaj konsultoj — komencis preni klarajn formojn. Surbaze de la provizora raporto de la aganta direktoro de CED, d-ro J. Pool, kaj de la kunveno de CED en Kopenhago, kiun gvidis s-ro U. Lins, la Komitato decidis, ke estu nomitaj tri estraranoj de CED, ke UEA certigu la ekziston de *Novaŭfletoro por interlingvistoj*, kiun redaktas s-ro Lins, kaj ke la Informa Fakto de UEA transprenu la pluan eldonadon de dokumentoj similaj al la ĝisnunaj CED-dokumentoj. Tre baldaŭ rekomencos aperadi *La Monda Lingvo-Problemo*.

Entute, la kopenhaga UEA komencis montri tre esperigajn signojn de financa resaniĝo kaj pli vasta integriĝo. Krom la jam menciitaj alligiĝoj de pluraj fakaj asocioj, bonaŭgura estas la deziro de la junulara sekcio kunlabore kun UEA ellabori novan regularon de TEJO. Sekve al sia aliĝo al UEA, UMEA nomis novan komitatanon A, d-ron Ferenczy, kio levis la nombron de komitatanoj A kaj B al 56 kaj permesis al la Komitato alekti plian komitatanon C. Li estas s-ro G. Maertens, de jaroj tre aktiva en UEA kiel revizoro kaj membro de la financa komisiono. La Komitato unuanime aldonis 7 novajn nomojn al la listo de honoraj membroj (v. detalojn aliloke en ĉi tiu numero). Ĝi konfirmis aŭ rekonsistigis plurajn el la konstantaj

komisionoj kaj decidis starigi du novajn komisionojn: pri edukado kaj pri kulturo. Oni antaŭvidas, ke en la kadro de tiu lasta formiĝos subkomisiono pri eldona agado, kiu malŝarĝos la Centran Oficejon pri libro-eldonado kaj tamen ebligos al UEA preni denove elstaran rolon sur tiu kampo.

El 70 komitatanoj de UEA, la 7 kopenhagajn kunsidojn ĉeestis meze 45. La 7 kunsidojn de la Estraro ĉeestis ne nur ĉiuj estraranoj, la direktoro kaj la vicdirektoro, sed ankaŭ diversaj aliaj invititoj, ekzemple estraranoj de TEJO, membroj de la LKK-oj de Kopenhago, Ateno kaj Rejkjaviko kaj aliaj laŭ la bezonoj de la tagordo. El ĉiuj tiuj kunsidoj naskiĝis ankaŭ la resolucioj, kiujn ni publikigas aliloke en ĉi tiu numero: du de la Komitato, kaj aliaj du transprenitaj de la Kongreso kiel tuto. Ilia enhavo formas la kompletigon de ĉi tiu raporto.

Victor Sadler

LA KONGRESA REZOLUCIO PRI LA ROLO DE LA INDIVIDUO EN LA MOVADO

La 60a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Kopenhago de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975 diskutis la temon "La rolo de la individuo en la Esperanto-movado", kaj faris la jenajn konstatojn:

1. La estontaj prospero kaj sukceso de la Esperanto-movado grandparte dependas de ĝia efika utiligo de volontulaj fortoj;

2. Efika planado de estontaj aktivecoj postulas partoprenon de kiel eble plej vasta parto de la Esperanto-publiko, kiu libere kontribuu siajn ideojn kaj per tio ankaŭ sentu respondecon pri decidoj faritaj;

3. Efika interna regado de la diversaj Esperanto-organizaĵoj postulas kiel eble plej demokratajn organojn kaj kiel eble plej bonan utiligon de la homaj talentoj;

4. Ofte malhelpas efikan partoprenon en la Esperanto-movado la geografia izoliteco kaj la ekzisto de organizaj strukturoj ne plene respondaj al la bezonoj de la unuopaj membroj.

Sekve, la Kongreso prezentas la jenajn rekomendojn:

1. La diversaj Esperanto-organizaĵoj faru ĉion eblan por certigi maksimuman aktivan partoprenon de la ordinara membraro en la planado kaj agado de tiuj organizaĵoj;

2. La diversaj Esperanto-organizaĵoj ekzamenus siajn strukturojn por certigi kiel eble plej demokratian funkciadon;

3. Esperanto-kongresoj kaj konferencoj celu aktive partoprenigi la ĉeestantojn kaj efektive liveri al ili forumojn por iliaj ideoj;

4. La unuopaj membroj trovu vojojn por proponi siajn servojn al la Esperanto-movado kiel volontuloj, ekzemple per la Volontula Servo de UEA.

Impona festo por la jubileo

EN LA ĈEESTO de ĉ. 1100 kongresanoj (entute aliĝis 1227) kaj pluraj dekoj da gastoj, la jubilea 60a Universala Kongreso de Esperanto estis inaŭgurita dimanĉon, la 27an de julio, en la teatra salonego de Falkoner Centret, kiu dum la kongresa semajno portis la tradician nomon "Salono Zamenhof". En bonveniga paroladeto la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, memorigis, ke precize antaŭ sepdek jaroj "la pioniroj de nia lingvo" unuafoje kongresis en la franca urbo Bulonjo-sur-Mar. La prezidanto emfazis, ke Danlando estas aparte taŭga por festi tiun jubileon: "Kvankam malgranda lando, ĝi faris eksterordinarajn kontribuojn al la monda kulturo . . . Kvankam malgranda lando, ĝi tenas firme siajn tradiciojn. La dana lingvo vivas kaj floras spite al fortaj najbaroj. Kiel parolantoj de Esperanto, kiu proponas solvon de internaciaj lingvaj problemoj per internacia lingvo, kaj tiel la ŝirmon de la naciaj kulturoj, ni tion rigardas kun plezuro kaj espero. Kvankam malgranda lando, Danlando ĉiam tenis alte la rajtojn, privilegiojn kaj socian bonfarton de la individuo. Ni, Esperanto-parolantoj el ĉiuj mondopartoj, salutas la landon de Andersen, Kierkegaard, Brahe, Blixen."

Post saluto de la prezidanto de LKK, s-ro Gustav Kühlmann, paroladis pluraj danaj oficialuloj: Nome de la dana kulturministro salutis s-ro O. Perch Nielsen, kiu interalie agnoskis, ke Esperanto estas plej proksima al la rolo de la dua — internacia — lingvo kaj, ke ĝi pruvis sian vivkapablon. La vicurbestro de Frederiksberg (la komunumo, en kiu okazis la Kongreso), s-ro Christian Lauritz-Jensen, provis eldiri sian salutparoladon en Esperanto kaj alte aprezis la konvinkon de esperantistoj, "ke eblas en internacia kultura skalo krei interkompreniĝon inter la mondpartoj, inter la landoj, inter la popoloj". Simpatian paroladon faris unu el la urbestroj de Kopenhago, s-ro Alsing Andersen, kiu substrekiis la gravecon de senperaj homaj kontaktoj kaj laŭdis la "historian kontribuon", kiun faras la Esperanto-movado sur la kampo de la interhoma kompreniĝo.

Sekvis atentigo de d-ro Tonkin pri la mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow, al la 60a UK (la mesaĝo estis presita ankaŭ en la Kongresa Libro). Tiam la prezidanto de UEA prezentis s-ron Preben Kirkegaard, kiu reprezentis la Danan Nacian Komisionon por Unesko kaj sidis ĉe la prezida podio, kune kun la estraranoj de UEA, prof. Paul Neergaard, rektoro de ISU, Ib Schleicher, prezidanto de Dana Esperanto-Asocio, la prezidanto



de LKK kaj la direktoro de la C.O. de UEA. La Kongreson salutis ankaŭ la vicprezidentino de la Dana Nacia Konsilantaro por Virinoj, s-ino Lone Hørup-Knudsen. El la membroj de la Honora Komitato ĉeestis Jørgen Kleener, prezidanto de la Radio-Konsilantaro; Hans Sølvehøj, ĝenerala direktoro de la Dana Ŝtata Radio, sendis reprezentanton; skribe salutis la Kongreson Poul Hansen, ĝenerala direktoro de PTT.

En muzika paŭzo, la svisa pianistino Danielle Béguin tre kompetente pianludis pecon de Ignacy Paderewski, pola komponisto, kiu estis samtempulo de Zamenhof, kaj — omaĝe al la kongreslando — peceton de la dana komponisto Carl Nielsen.

La nelonga festparolado de d-rino Flora Szabó-Felső, estraranino de UEA, estis dediĉita al la kongresa ĉeftemo kaj la Internacia Jaro de la Virino. D-rino Szabó-Felső atentigis, ke jam en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj troviĝas mencio de la egalrajteco de viroj kaj virinoj kaj ke sur tiu kampo jam multo estas atingita, sed, same tiel, multo restas ankoraŭ farenda. Fine de sia parolado d-rino Szabó-Felső diris: "La rolo de Esperanto en la emancipiĝo de la virinoj estas duflanka: Unuavice, la Internacia Lingvo liveras al ni taŭgan formon por la interŝanĝo de spertoj kaj proponoj sur tiu ĉi grava kampo — sen lingvaj kaj naciaj malhelpoj. Due, nia propra movado povas montri al la virinoj, ke ĝi scias kiel trakti ilin egale kaj kiel antaŭenigi tiun egalecon ankaŭ ekster niaj rondoj".

La reprezentiĝo de la kopenhagaj diplomatoj estis vere impona en la Solena Inaŭguro de la 60a UK: entute estis reprezentitaj 20 ŝtatoj. La Kongreson salutis jenaj diplomatoj: Aŭstrio: la aferŝarĝito d-ro F. Irbinger; Belgio: la ambasadoro J. Smets (tradukon de lia saluto legis d-ro P. Denoël); Bulgario: la ambasadoro Belomaĵov (parolis en Esperanto kaj invitis UK en 1978 al Varna); Finnlando: la aferŝarĝito S. Masanen (sendis

skriban saluton, kiun legis s-ino H. Kesälä); Greklando: la aferŝarĝito Mileresis (parolis en Esperanto kaj invitis al la 61a UK en Ateno); Islando: en la nomo de la kulturministro salutis s-ro B. Ragnarsson; Italio: la kulturataŝeo prof. M. Nati; Japanio: la ambasada konsilanto Y. Matsuda; Malto: la konsulo J. Buhl; Monako: la ĝenerala konsulo V. Jespersen; Norvegio: nome de la registaro salutis kapitano R. Bugge-Paulsen; Pollando: la ambasada sekretario S. Stefanski; Usono: la dua sekretario de la Ambasado P. Heller. La Inaŭguron ĉeestis ankaŭ: la tria sekretario de la Brita Ambasado Napier, la ambasadorino de Hinda Unio s-ino K. Rukmini Menon, la aferŝarĝito de la Hungara Ambasado L. Meszáros, la dua sekretario de la Kanada Ambasado f-ino J. Howard, la kanceliero de la Nederlanda Ambasado s-ro Verstraeten, la ambasadoro de Tajlando princo Prem Purachatra, reprezentanto de la Tutmonda Federacio de Sciencistoj prof. V. Peevski kaj reprezentanto de la Monda Asocio de Mondfederalistoj K. Nielsen.

Post la tradicia saluto de la Infana Kongreseto, la prezidanto de UEA fermis la inaŭguran solenaĵon per i.a. jenaj vortoj: "En la hodiaŭaj tagoj ni legas pri tiu miraklo de la modernaj scienco kaj teknologio, la spaca veturado de rusaj kaj usonaj kosmonaŭtoj. Kaj kiel tiuj reprezentantoj de nia moderna socio komunikas? Per du lingvoj, balbute, pene akiritaj. Ĉu ili ne konscias, ke la atingoj de la moderna scienco kripliĝas per ŝtonepokaj rimedoj de komunikado? . . . Universala Esperanto-Asocio estas organizo neŭtrala, kiam temas pri politiko, kaj ni ĵaluze gardas tiun neŭtralecon. Sed ni havas nian firman pozicion en demandoj, kiuj rilatas al lingvoj. Ni estas por la utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj internaciaj rilatoj. Ni estas kontraŭ pli limigitaj solvoj kiuj utiligas naciajn lingvojn internacie. Ni estas por la konservado de la naciaj lingvoj por nacia komunikado, kaj kontraŭ la senbridaj influoj de fremdaj naciaj lingvoj kaj kulturoj. Ni estas por la respekto de la bazaj homaj rajtoj, speciale en rilato kun lingvo, kaj kontraŭ tiuj, kiuj celas limigi tiujn rajtojn. . . . Ni estas kontraŭ la diskriminacio surbaze nur de la lingvo, kiun homo parolas. Ni estas kontraŭ ŝajnaj solvoj de la lingva problemo surbaze de tradukado aŭ interpretado. Ni estas por la rekta, senbrida internacia kompreniĝo, surbaze de la Internacia Lingvo Esperanto."

LA FESTAJ ARANĜOJ EN KOPENHAGO eble ankaŭ pro la ĝenerala etoso de la Kongreso estis pli festaj ol kulture. Malgraŭ la altaj prezoj, al la Bankedo aliĝis la maksimuma nombro de 300 kongresanoj; la akceptojn en la urbodomoj de Frederiksberg (sur la foto) kaj Kopenhago ĝuis 1100 partoprenintoj de la 60a UK; kvindeko da invititoj estis en la bankedo de UMEA (aranĝita de d-ro H. Shinoda) kaj same tiom da membroj de la Societo Zamenhof estis en aparta akcepto fare de la prezidanto de UEA; ĉiuj lokoj en la ekskursoj estis disvenditaj (ĉ. 750 biletoj); la Balon, kompreneble, partoprenis la tuta kongresanaro.

REZOLUCIO DE LA KOMITATO DE UEA AL LA EŬROPA KONFERENCO POR SEKURECO KAJ KUNLABORO

La Komitato de UEA, supera gvida instanco de la organizaĵo, kunveninta en Kopenhago dum la 60-a Universala Kongreso de Esperanto, kun plena intereso kaj apogo atentante la laboron de la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro,

konstatinte,

1. ke la ĉiam kreskanta problemo de multlingveco grave bremsas la liberigon kaj plivastigon de la kunlaboro celata de la Konferenco, kiel evidentiĝas eĉ per la komplikaĵoj prepari identajn tekstojn de la konferenca rezolucio en ses lingvoj;
2. ke la problemo de multlingveco aparte akre aperas en la kampo de personaj kaj neoficialaj rilatoj, kies signifon speciale atentis la Konferenco;
3. ke justa, egalrajtiga kaj adekvata solvo de ĉi tiu problemo povas troviĝi nur en la ĝenerala adopto de internacia planlingvo, kiel jam dum jardekoj pruvis la ĉiukampa funkciado de la Internacia Lingvo Esperanto;

reprenante en konsideron la samteman rezolucion akceptitan dum la 58-a Universala Kongreso de Esperanto en Beogrado en 1973,

proponas, ke la komitato de registaraj ekspertoj, kiuj kontrolas la realigadon de la konferencaj decidoj, pozitive konsideru la jam entreprenitajn paŝojn por apliki Esperanton en sociaj, politikaj kaj sciencaj medioj (parlamentoj, partioj, sindikatoj, universitatoj) kaj helpu al plejeble vasta antaŭenigo de tiuj klopodoj.



La festa laboraranĝo

DISTINGA TRAJTO de la inaŭgura solenaĵo de la lastatempaj Universalaj Kongresoj estis ĝia longeco, ĉar ĝi malofte sukcesis finiĝi en malpli ol tri horoj. Konsciante, ke tiu longdaŭro ŝuldiĝas al pozitiva fakto — konsiderebla kiel fierinda atingo —, al la de jaro al jaro kreskanta nombro de registaraj reprezentantoj, la Estraro de UEA decidis ĉi-jare eksperimente disdiigi la inaŭguran solenaĵon. Nome, antaŭtagmeze okazis la "Inaŭguro" kun la ĉeesto aŭ salutoj de honoraj gastoj kaj festparolado pri la kongresa ĉeftemo, kaj posttagmeze sekvis la "Malfermo", dum kiu la kongresanoj aŭskultis paroladon de la prezidanto de UEA pri aktualaj problemoj de la Movado kaj la salutojn de la reprezentantoj de la landaj asocioj de UEA, por fine — sen ĉeesto de la gastoj — kanti la Himnon. Ŝajnas, ke tiu eksperimenta dispartigo de la inaŭgura solenaĵo bone sukcesis kaj, ke necesas ĝin ankaŭ estonte praktiki: la Inaŭguro servu por alekstera sinprezento de la Esperanto-movado, dum la Malfermo (kiu ne nepre devas konservi tiun nomon) estu interna afero de la Movado kaj eventuale kombiniĝu kun la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA.

La Malfermon prezidis d-ro W. Bormann, vicprezidanto de UEA. Post liaj enkondukaj vortoj, d-ro Sadler prezentis la salutantojn nome de la landaj asocioj: por Argentino s-ro B. Ostropolski, por Aŭstralio s-ro E.W. Chandler, por Aŭstrio s-ino M. Marischler, por Belgio f-ino N. Verhelst, por Brazilo s-ro R. Diniz (kiu menciis, ke Brazilo konsideras inviti UK en 1980), por Britio s-ro J. Brownlee, por Bulgario s-ro N. Aleksiev, por Ĉeĥio s-ro D. Kočvara, por Danlando s-ro I. Schleicher, por Finnlando s-ino T. Tyynelä, por Francio f-ino C. Nourmont, por FR Germanio s-ino I. Tautorat, por Greklando s-ro G. Miggas, por Hispanio s-ro J. González-Aboín, por Hungario s-ro I. Kutás, por Israelo s-ro J. Giladi, por Italio s-ro A. de Giorgi, por Japanio s-ino Y. Isobe, por Kanado f-ino L. Labelle, por Nederlando s-ro G. Berveling, por Norvegio s-ro O. Prytz, por Pollando s-ro S. Świstak, por Sud-Afriko s-ino A. Fouché, por Svedio s-ro S. Alexandersson, por Svislando s-ino A.L. Nicolodi kaj por Usono s-ro T. Goldman. Sekvis salutoj de landaj asocioj nealiĝintaj al UEA: Germana DR (s-ro R. Graetz, kiu salutis ankaŭ nome de la ambasadoro de GDR en Kopenhago), Islando (s-ro B. Ragnarsson), Kolombio (s-ro L. Mejía), Portugalio (s-ro A. Correa), Slovakio (s-ro P. Rosa), Soveta Unio (s-ro D. Armand). Krome, salutis s-ro N. Isaac el Egiptio, s-ro E. Loores nome de la ĉefministro de Tasmanio (Aŭstralio) kaj s-ro J. Pegiel, direktoro de la pola flugkompanio LOT.

Sekvis longa kaj detala, pri pluraj demandoj preskaŭ elĉerpe analiza parolado de la prezidanto de UEA. Tiu

parolado ne similis al la kutimaj festparoladoj en la Universalaj Kongresoj, nek tio estis ĝia celo. Ne unuavice ĝiaj retorikaj kvalitoj, sed antaŭ ĉio ĝia enhavo, sincereco en la elekto de la aktualaj problemoj kaj kuraĝo per kiu d-ro Tonkin traktis la tuŝitajn temojn, ĉio ĉi faris el la malferma parolado la ĉefan kaj la plej atentindan elpaŝon dum la 60a UK.

Enkonduke, la prezidanto atentigis pri la 70-jara jubileo de la Universalaj Kongresoj kaj jene tuŝis ilian gravecon por la Esperanto-movado: "Ni saĝe nin demandus kiel — per kiaj rimedoj spiritaj aŭ fizikaj — la Esperanto-kulturo restis tiel vigla kaj fortika tra la jaroj; kiel nia Movado neniam perdis sian celkonscion kaj sian kuraĝon. Unu kialo estas la genia kreaĵo de d-ro Zamenhof mem, kiu komprenis, ke lingvo estas pli ol simpla instrumento, simpla ilo de komunikado — aŭ pli precize, ke la komunikado mem estas afero senfine komplika, kiu postulas la engaĝon ne nur de la parolorganoj sed ankaŭ de la spirito de la homo. Dua kialo



estas ĝuste la organiza strukturo de nia Movado, kaj precipe la Universalaj Kongresoj. Niaj kongresoj, kun sia longa historio, sia akumuliĝo de kunsidoj kaj renkontiĝoj, kulturaj eventoj kaj prelegoj, decidoj kaj rezolucioj kaj krizoj, homaj interrilatoj de la plej komplikaj ĝis la plej simplaj — kaj ĉio ĉi esprimita per unu lingvo, malgraŭ la multnacieco de la eventoj — niaj kongresoj konsistigas unu el la mirakloj de la moderna mondo kaj unu el la pruvoj pri la vivanteco de nia Esperanto-kulturo. La gravecon de niaj kongresoj kiel okazoj por la realisma alfronto de niaj taskoj, la difinado kaj konfirmo de niaj celoj, kaj la refreŝigo kaj refortigo de niaj animoj, oni ne povas tro forte emfazi."

Memorigante, ke "la lingva problemo fariĝas ĉiam pli akuta" kaj, ke tio estas plene evidenta "al ĉiu pens-

kapabla homo", d-ro Tonkin konstatis, ke tiu problemo restas "hontige longe nesolvita", ke oni improvizas ŝajnajn solvojn, "ke oni ne aŭtomate prenas la plej racian, la plej logikan solvon". Li tamen avertis, ke "kvankam la lingva problemo estas ĉie sentata, la plukinda frukto ne venos aŭtomate en niajn manojn." Transirante al internaj problemoj de la Esperanto-movado, la prezidanto de UEA refoje emfazis, ke "Nia unua problemo estas la financa." Li memorigis, ke la nuna Estraro tuj post la enoficiĝo "lanĉis zorgan kaj ĝisfundan analizon de la financa situacio de la Asocio", kio kondukis al drasta limigo de la pasintjara deficitito kaj ebleco, ke oni al la Komitato prezentu sendeficitan buĝeton por la jaro 1976. Atentigante, ke ne nur UEA, sed ankaŭ aliaj volontulaj organizaĵoj frontas simile gravajn financajn problemojn, d-ro Tonkin diris: "UEA, dank' al la lojaleco de ties membroj kaj stabanoj, estas relative feliĉa: nia agado daŭras, eĉ foje kun pligrandigita energio, kaj drastaj reduktoj de aktivecoj ne okazis. Tamen, ili okazos, se ni ne draste reformos nian financon kaj organizan politikon." Li aparte pledis por elimino de konkurenco inter movadaj organizaĵoj, por pli zorga kunordigo de la laboroj kaj por pli bona utiligo de la volontula forto, kiun li nomis "spino de nia organizo". Parolante pri la agadplanoj, d-ro Tonkin emfazis, ke necesas konscii pri la disponeblaj fortoj, ĉar oni ne povas labori "en dudeko da kampoj samtempe, sen kunordigo aŭ raciigo".

Apartan ĉapitron en la malferma parolado de la prezidanto okupis demandoj ligitaj al la informado kaj eksteraj rilatoj, tiel sur la landa kiel sur la internacia niveloj. Emfazante la esencan rolon, kiun ankaŭ plue ludos CED, d-ro Tonkin diris: "Ne konvinkos la registarojn aŭ la internaciajn organizaĵojn emociaj argumentoj bazitaj sur niaj propraj konstatoj pri la efikeco de Esperanto. Konvinkos argumentoj bazitaj sur science pruvitaj faktoj, prezentitaj lerte kaj kun adekvata kompreno de politikaj kaj sociaj cirkonstancoj." Jam en ĉi tiu parolado estis lanĉita propono, ke UEA en 1976 aŭ 1977 kunvoku internacian konferencon pri la estonta vojo de la Esperanto-movado. Revenante al demandoj de la interna strukturo de la Esperanto-movado, la prezidanto de UEA diris: "Ni estas konvinkitaj, ke nur per kolektiva agado por kolektivaj celoj ni elkreos tiun ideoriĉan, konvinkitan kaj potencon movadon, kiun ni bezonas por nia fina sukceso, kaj nur ĉar ni estas konvinkitaj, ke volontula organizo kiel la nia ne prosperas se ĝi laboras per gvidlinioj de supre, sed nur se ĝi laboras per kolektivaj decidoj kolektive faritaj."

Parolante pri la preparoj por la estonta revizio de la Statuto de UEA, d-ro Tonkin substrekis, ke "la centraj organoj de UEA, same nun kiel ĉiam, restas firme fidelaj al la neŭtraleco. Nome de la tuta Estraro mi deklaras, per ĉiuj fortoj je mia dispono, ke politika neŭtraleco, sur kiu estas bazita la unika grupiĝo de naciaj kaj fakaj organizoj, kiu konsistigas nian UEA, estas necesa elemento en tiu fina sukceso de nia agado,

kiun ni ĉiuj sopiras. Ĝi estas necesa, interalie, ĉar sen ĝi la diversaj landaj asocioj disiĝos en diversajn politikajn tendarojn, kaj la universaleco de nia Asocio estos detruita. Ni rezistos ĉiujn klopodojn, ĉu de dekstre, ĉu de maldekstre, skui aŭ detrui tiun fundamenton de nia agado."

Tuŝante denove la demandon de la financoj, la prezidanto parolis pri la Financa Programo de la Esperanto-Movado, al kiu nia revuo dediĉos apartan atenton en unu el la sekvantaj numeroj. Fine de sia malferma parolado, d-ro Tonkin deklaris: "Finante sian unuan jaron de deĵoro, la Estraro de UEA rigardas la estontecon kun optimismo kaj entuziasmo."

La Malfermo finiĝis per komuna kantado de la Himno.

LA ĜENERALAJ KUNVENOJ:

Kun reliefa tempritrakto

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO DE UEA estas tiu kongresa aranĝo, kiu tradicie estas dediĉita al la pritrakto de la agado de la Asocio dum la pasinta jaro. En Kopenhago oni pridiskutis la Raporton de la Estraro pri la agado de UEA dum 1974/75. Al la kunveno — la 28an de julio — venis pli ol 300 kongresanoj. Post enkondukaj klarigoj de la ĝenerala sekretario de UEA, diskutis proksimume 15 kongresanoj, ĉefe pri la financa stato de la Asocio. Interalie, aŭdiĝis ankaŭ kritikaj vortoj pri nia revuo, kiu — laŭ tiuj rimarkoj — ankoraŭ ne faris ĉion por ĉesigi la malutilajn polemikojn en la Movado. Krome, la kunveno traktis kelkajn aliajn demandojn pri kiuj nia revuo jam detale okupiĝis en antaŭaj numeroj (malkresko de la membro-nombro, la pasintjara deficitito, k.s.). Cetere, la Estrara Raporto, kiun ĉiuj kongresanoj trovis en siaj dokumentujoj, estas senpage havebla ĉe la CO de UEA.

LA DUA ĜENERALA KUNVENO (la 1-an de aŭgusto) estis dediĉita al la kongresa ĉeftemo "La socia pozicio de la virino". Ĝi estis bone preparita kunveno en kiu ĉeestis pluraj centoj da kongresanoj. La enkondukaj referaĵoj de U. Grattapaglia (Brazilo), E. Borrmann (FR Germanio), E. Pallos (Hungario) kaj Y. Iso-be (Japanio) donis reliefan bildon pri la pozicio de la virino en diversaj mondpartoj. Tion kompletigis M. Haudebine, kiu parolis pri la virina pozicio en Hinda Unio; I. Klemola (Finnlando) interese traktis la ideologian flankon de la demando pri la virina egalrajteco, J. Tonkin parolis pri la stato en Usono kaj B. Beleva pri tiu en Bulgario. Kontribuis ankaŭ A. Fighiera-Sikorska (Belgio), U. Luin (Svedio), E. Matland (Norvegio) kaj pluraj aliaj. Kelkaj elpaŝoj en la Dua Ĝenerala Kunveno estis tiaj, ke ni klopodos pli detale resumi ilin en unu el niaj sekvantaj numeroj.

Cento da kunvenoj

SUPRAĴAJ KALKULOJ montras, ke en la kadro de la 60a UK okazis almenaŭ cento da laboraj aranĝoj, el kiuj pli ol 30 estis kunvenoj de diversaj fakaj asocioj. UEA mem dum la kopenhaga Kongreso okazigis minimume 65 laborkunvenojn, kiuj traktis diversajn aspektojn de la asocia agado. Se oni al tio aldonas du-dekon da festaj, kulturaj kaj artaj programoj, denove trudiĝas la demando de proporcioj inter la simplaj homaj eblecoj unuflanke, kaj tioma svarmo de interesaj kunvenoj aliflanke. Ĉu la reekzameno de la tradicia kongresa programo — kiu pozitive sentiĝis ĉe kelkaj kongresaj aranĝoj — ne devus tuŝi ankaŭ la nombron — sekve ankaŭ la efikecon — de la ampleksega kongresa kunvenaro? Kiel ajn tio ŝajnu malebla, ni ĉi tie klopodos almenaŭ menci la plej gravajn el la okazintaj fakaj kunvenoj.

Unu el la kunvenoj de CED traktis aparte demandojn pri kiuj interesiĝas **interlingvistoj**, kiuj ankoraŭ ne havas apartan movadan organizaĵon. Trideko da ĉeestintoj diskutis la rilatojn inter esperantologio kaj interlingvistiko kaj demandojn ligitajn al *Novaŭletero de interlingvistoj*. La 8 ĉeestintaj **akademianoj** kunvenis sub la prezido de A.D. Atanasov kaj i.a. okupiĝis pri la eldonota nova kajero de *Aktoj de la Akademio*, eventualaj kandidatoj en la novaj elektoj kaj refreŝigo de kelkaj akademiaj sekcioj. En la kunveno de **Eŭropa Esperanto-Centro** trideko da personoj analizis rezultojn de la ĝisnuna agado ĉe instancoj de Eŭropa Ekonomia Komunumo; oni traktis ankaŭ la parlamentan agadon kaj kelkajn eldonprojektojn. En la kadro de sia 14a jarkunveno la **medicinistoj**, kies organizaĵo UMEA nun estas aliĝinta faka asocio de UEA, anoncis, ke la ĉi-jaraj gajnintoj de la UMEA-Premio estas C.L. Melo kaj M.C. Rodrigues, ambaŭ el Brazilo. La kunveno akceptis apartan rezolucion adresitan al la Monda San-Organizo kaj naciaj ministerioj pri sano. Plurdeko da **instruistoj**, komitatanoj kaj membroj de ILEI, sufiĉe viglis dum la kongresa semajno. Ili ellaboris rezolucion, kiu pledas por baldaŭa ordigo de la rilatoj inter ILEI kaj UEA. La ĉefa novaĵo, kiu aŭdiĝis en la kunveno de la **sciencista** organizaĵo ISAE, estis la informo de prof. Peevski, ke la revuo *Scienca Mondo* baldaŭ ekaperos ankaŭ en Esperanto. **Muzika Esperanto-Ligo** jarkunvenis en Kopenhago; en la jara raporto oni menciis, ke MEL nun havas 76 membrojn. **Skoltoj** en sia kunveno diskutis projektojn por kiuj eblus utiligi la mondonacon, kiun UEA ricevis por agado en skoltaj medioj. Oni sendis saluttelegramon al la samtempe okazinta Monda Ĵamboreo en Norvegio. Kiel kutime, **fervojistoj** ankaŭ en Kopenhago havis sian tuttagan programon, kiun partoprenis 45 kongresanoj el 11 landoj. Tiu programo inkluzivis studviziton al la kopenhaga var-terminalo, prelegon kaj akcepton. La kunveno de **aŭtomobilistoj** (60 ĉeestintoj) i.a. traktis la preparojn

LA KONGRESA REZOLUCIO OKAZE DE LA INTERNACIA JARO DE LA VIRINO

La 60a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Kopenhago de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975, diskutinte la socian pozicion de la virino sub la ĝenerala temo "La Virino"

notas kun aprobo la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties specialigitaj organizaĵoj por plifortigi la rajtojn kaj pozicion de la virino;

konstatas ke malhelpoj al egalrajteco en la diversaj landoj estas ofte sociaj kaj kulturaj, do ne nur juraj malhelpoj;

alvokas al ĉiuj partoj de la Esperanto-movado studi tiun ĉi problemon kaj entrepreni paŝojn por akceli la atingon de egalrajteco jura, socia kaj kultura, kaj antaŭenigi la rolon de la virino en la gvidado de la Esperanto-movado;

kaj **atentigas** pri la avantaĝoj de la Internacia Lingvo Esperanto kiel perilo de konstrua diskutado pri tiu kaj aliaj sociaj kaj kulturaj demandoj.

por eldono de seslingva aŭtomobilista terminaro.

Mondpaca Esperantista Movado (126 ĉeestintoj) dediĉis sian kunvenon al la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro. **Rotaria Asocio de Esperantistoj** havis sian fondkunvenon en Kopenhago kaj tuj subskribis kontrakton pri kunlaboro kun UEA. Krome, dum la kongresa semajno kunvenis ankaŭ filologoj (21 ĉeestintoj), filatelistoj, ornitologoj (27 ĉeestintoj), veteranoj, poŝtistoj, ŝakistoj (ili organizis ankaŭ apartan ŝakturniron), militrezistantoj, juristoj, matematikistoj, radioamatoroj, Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj, kvakeroj kaj reprezentantoj de libroservoj. Okazis ankaŭ pluraj religiaj kunvenoj (interreligia, kristana, bahaa), kaj la tradician kongresan Diservon partoprenis ĉ. 400 kongresanoj, kiuj samtempe ĉeestis geedziĝan ceremonion de japanino Kazue Sugawara kaj franco Michel Audibert.

* * *

Tute maltradicia estis la kunveno kun la redaktoroj de *Esperanto* kaj *Heroldo*. Kongresanoj montris grandan intereson pri ĝi kaj ĝi estus bonvena ankaŭ estonte.

* * *

Du kandidatoj aperis en la Internacia Ekzameno, sed ambaŭ malsukcesis en la skriba parto. La ekzamenkomisionon gvidis prof. P. Neergaard.

* * *

La 29an de julio la kongresanoj povis vidi kvar filmojn en Esperanto: *La kvina fasado* (Aŭstralio), *Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj* (Germana Dem. Respubliko), turisman filmon pri Greklando kaj novan filmon de FIAT.

La jubilea 25a rikolto

La kunveno en kiu oni anoncis la rezultojn de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj havis solenan etoson en Kopenhago, ĝuste kiel konvenas al la 25-jara jubileo de ĉi tiu grava institucio de la Esperanta kulturo. Al la jubilea kunveno – en la salono "Grabowski", la 1-an de aŭgusto – venis minimume 300 personoj. Krom la ampleksa raporto de la prezidanto de la juĝkomisiono, kiun ni aperigas en ĉi tiu numero, oni aŭdis ankaŭ paroladon de la prezidanto de UEA kaj deklamon de kelkaj premiitaj poemoj (legis la ĉe-estantaj premiitoj Zora Heide kaj Albert Goodheir, plus C.Minnaja kaj S.Milojević). En la sama kunveno Torben Kehlet raportis pri la ĉi-jara Foto-Konkurso, kaj Margaret Hill kantis du komponaĵojn laŭ tekstoj de William Auld, kies nomo ĉi-jare reaperis inter la partoprenintoj de la jubileaj Konkursoj.

NOVA PRIJUĜA KOMISIONO eklaboris plennombre ekde aprilo, konsistanta el Baldur Ragnarsson, prezidanto (Islando), Alec Venture, sekretario (Anglio) – ambaŭ funkciantaj ekde septembro lasta –, Vilmos Benczik (Hungario), Edwin de Kock (Sud-Afriko), Miyamoto masao (Japanio), Carlo Minnaja (Italio), Johan Rosbach (Norvegio), Ivo Rotkvić (Jugoslavio), Pierre L. Ullman (Usono) kaj Eli Urbanová (Ĉeĥoslovakio). Ĉiuj komisionanoj estas bone konataj al la esperantistaro pro siaj literaturaj priokupoj kritikaj aŭ kreaĵoj. Ili apartenas al ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio kaj tiel konsistigas la plej internacian juĝkomisionon ĝis nun en la historio de la Konkursoj.

En la komenco de la konkursjaro estis decidite utiligi eblecojn de branĉara plivastigo, konforme al art. 1, paragr. 3 en la Regularo de la Belartaj Konkursoj, kaj proklami fotografion kiel konkursan branĉon por 1975. Por prizorgi tiun novan branĉon estis akirita la kunlaboro de Torben Kehlet (Danlando).

Eniris la Konkursojn ĉi-jare entute 88 eroj, el kio 58 poemoj, 23 prozaĵoj kaj 7 drametoj de 39 aŭtoroj el 17 landoj (lastjare 90 eroj de 48 aŭtoroj el 23 landoj). La rezultoj estis la jenaj:

ORIGINALA POEZIO: 1. **Stojan Ĝuĝev** (Bulgario) por "La najlo de la hoĝo Nasr Eddin"; 2. Egale al: **Albert Goodheir** (Skotlando) por "Postsomeraj strofoj" kaj **Nicolino Rossi** (Italio) por "Uraganoj"; 3. **Zora Heide** (Danlando) por "Vizio"; laŭda mencio: **Aldo de' Giorgi** (Italio) por "Mi bezonas preĝi".

TRADUKITA POEZIO: 1. **William Auld** (Skotlando) por "La blinda knabo" de Colley Cibber; 2. **Gaudenzio Pisoni** (Italio) por "La poeto" de Umberto Saba; 3. **Albert Goodheir** (Skotlando) por "Ĥoro de bakĥantinoj" de Eŭripido.

ORIGINALA PROZO: 1. **Nealjuĝita**; 2. **Ray Smith** (Anglio) por "Por kapti ŝteliston"; 3. **Andreo Szabó** (Hungario) por "Karuselo"; laŭda mencio: **Julius Balbin** (Usono) por "Al martirigita amiko" kaj "Stranga muziko".

TRADUKITA PROZO: 1. **Nealjuĝita**; 2. **William Auld** (Skotlando) por "La alia sekso" de Laurie Lee; 3.

Charles R.L. Power (Usono) por "Sangantaj ŝtonoj" de Harlan Ellison.

DRAMO ORIGINALA kaj TRADUKITA: Neniu premio aljuĝita.

PREMIO HARABAĜIU por NOVA TALENTO: **Miroslaw Wiechowski** (Pollando) por la originalaĵo "Tri poemetoj sen titolo" kaj la tradukaĵo "La tago plej kurta" de Jonas Negalha.

Komentoj pri unuopaj branĉoj

ORIGINALA POEZIO: La originala poezio akiris mez-nombre 29 poentojn por konkursaĵo el la eblaj 60. Prijuĝoj fojfoje estis tre diferencaj, tiel ke eĉ okazis, ke unu juĝanto aljuĝis ĝis 12 poentoj, dum alia aljuĝis neniun poenton al la sama konkursaĵo. Tio atentigas pri la fakto, ke juĝoj pri arto estas ĝis certa grado ĉiam subjektivaj. Precipe la juĝa subjektiveco ŝajnas konstatebla ĉe verkoj, kiuj evidente malproksimas de ambaŭ ekstremoj: tiu de objekte tuj konstatebla alta kvalito kaj tiu de objekte tuj konstatebla malalta kvalito. Kontraŭe, la prijuĝoj pri tiuj du ekstremoj estis sen-escepte kongruaj inter si; pri la grupo subnivela oni konstatas en la juĝkomentoj rimarkojn evidente bazitajn sur objektivaj observoj pri lingvaj eraroj, mallertaj son- kaj vort-kunmetoj, naciaj idiotismoj, licencoj ne facile pardoneblaj. Objektivaj rimarkoj pri enhavo ĉi tie ankaŭ validas, ekzemple pri banaleco de temo, manko de originalaj ideoj k.s. Rilate al la plej alte poentita grupo la samo estas konstatebla: la juĝoj harmonie kongruas inter si kaj la komentoj grandparte mencias objekte observeblajn trajtojn, kiel ekz. frapajn metaforojn, kuraĝajn kaj trafajn komparojn, efikajn konstruojn ideoj, rime kaj ritme. Subjektive nuancitaj prijuĝoj tamen ankaŭ ĉi tie troveblas, kiel "speciale ĉarma poemo". Sed tiaj komentoj estas ja atendeblaj kaj oni nur povas miri pri la kongrueco inter la prijuĝaj komentoj, kio ja evidentigas sufiĉe objektivan juĝbazon.

TRADUKITA POEZIO: Ĝenerale la nivelo de la tradukita poezio estis pli alta ol ĉe la originala poezio kun la meznombre 40 poentoj por konkursaĵo el la eblaj 60. Apartaj malfacilaĵoj aperas en la juĝado de tradukita poezio, nome la limigitaj lingvoscioj de la

juĝantoj. Estas mem evidente, ke eĉ persono bone ekipita je lingvaj scioj kapablas prijuĝi kompetente nur etan porcion da eventualaj taskoj, reprezentantaj la plej diversajn lingvojn. La fakto, ke nur sep lingvoj estis reprezentitaj de la nunjaraj poeziaj konkursaĵoj (la angla, itala, pola, bulgara, japana, korea kaj papia-menta) ne ŝanĝas la bildon, ĉar efektive neniuj el la tri juĝintoj de la tradukita poezio konas ĉiujn tiujn lingvojn. En la kazo de neceso ili do devis peti helpon de eksteruloj. Demando estas, ĉu pli kontentiga solvo de tiu ĉi juĝproblemo estas trovebla kaj tiam en kunligo kun zorge difinitaj kriterioj pri la tradukarto.

Juĝante pri tradukoj oni ĉiam staras antaŭ tri demandoj: ĉu la tradukinto laŭeble fidele transdonis la formon de la originalo per la rimedoj je sia dispozo; due: ĉu li laŭeble fidele konservis la enhavon de la originalo, kaj trie: ĉu la nova kreaĵo, la tradukaĵo, estas sendepende bona artaĵo per si mem, sen konsidero pri la originala teksto. Legante la komentojn de la juĝantoj pri la tradukita poezio ĉi-jare, oni tuj konstatas respeguliĝon de ĉiuj ĉi punktoj. Estas interese, ke tiuj konkursaĵoj, kiuj transdonas kontentige nur la enhavon de la originalaj tekstoj estas preskaŭ egale multaj kiel tiuj, kiuj konservas kontentige nur la formon de la originalo. Kompreneble, la enhave fidelaj tradukoj estas ankaŭ gradigeblaj, iuj estas laŭvortaj, iuj pli liberaj. Samo validas pri la formo, iuj penas rigore konservi la originalajn rimojn kaj ritmon, iuj adaptiĝas malpli strikte. Nur tri konkursaĵoj estis unuanime prijuĝitaj kiel plene kontentigaj kaj enhave kaj forme, parolante pri fideleco al la originalo, kaj nur unu el tiuj samtempe senrezerve kontentiga kiel alta esprimo arta per si mem en sia Esperanta vesto.

ORIGINALA PROZO: La originala prozo akiris meznombro 29 poentojn por konkursaĵo el la eblaj 60. Laŭ la komentoj de la juĝintoj oni povas konstati certan seniluziiĝon pro la ĝenerale nealta nivelo de la prozaj konkursaĵoj. La plej evidentaj mankoj ŝajnas esti la jenaj:

1. Ĉe la pliparto de la konkursaĵoj manko de altranga kono pri la leĝoj regantaj la internan strukturon de literatura prozverko, kio supozeble povas deveni nur el tio, ke la koncernaj konkursintoj ne legis sufiĉe, nek en Esperanto nek en sia nacia lingvo. Tio rezultigas nekonscion pri aŭ pretervidon de la nepra valoro de primetiaj scioj por la kreo de bona prozo. Oni do emas konsili al tiuj, kiuj deziras verki novelojn en Esperanto, ke ili studu la noveltipojn de la moderna literaturo kaj lernu pri ili ĉion lerneblan, kaj nur poste prenu la plumon por propra verkado.

2. Dua manko konstatita estis tromemfido, eĉ aroganteco koncerne la elekton de temo. Multaj konkursintoj elektis por pritrakto t.n. "grandajn" filozofiajn temojn kaj strebis krei tutecan, totalan mondbildon anstataŭ rakonti konkrete pri vivaj personaĵoj. Verkoj bazitaj sur nebula filozofio, gravmiene rakontitaj, restas nur fuŝeseoj pri filozofio, ne noveloj. Ĉirilate la pliboniga konsilo povus esti: Prefere rakonti vivkonkrete pri aferoj, kiujn oni

konas profunde el sia propra sperto aŭ longa pripensado ol lasi sin tenti de "alta" temo.

3. Estis konstatite, ke la stilo de multaj konkursaĵoj estas ĝenerale tro poezia, tro lirikeca, tro "literatura". Pliboniga konsilo: Eviti ŝvebantajn lirikecon, prefere klopodi al interesveka epikeco.

4. Konstatita estis manko de praktiko en la verkado. La usona novelisto Bradbury iam diris: Oni verku ĉiusemajne novelon, kaj post unu jaro — do, post la kvindekdua novelo — oni jam fariĝos legebla verkisto. Konkluda konsilo: Oni ne volu nepre publikigi sian unuan verkon.

5. La konkursintoj ŝajne apenaŭ konscias pri la bezonoj de nia legantaro. Tute mankas interesaj historioj, kvankam estas evidente, ke la plimulto de la homoj pretas legi nur interesajn novelojn. Pliboniga konsilo? Por sukcesigi novelon necesas fari ĝian agadon interesa, — la intereskapta agado estas nemalhavebla trajto de sukcesa novelo.

TRADUKITA PROZO: La tradukita prozo akiris meznombro 29 poentojn por konkursaĵo el la eblaj 60, kio estas la sama meznombro kiel ĉe la originala prozo.

Rilate al la prozo tradukita oni povas nur ripeti la jam diritan pri la tromemfida elekto de temo. Krome estis konstatite, ke ĝenerale la lingva kaj stila niveloj de la tradukoj estis pli-malpli plibonigendaj (kun elstaraj esceptoj, kompreneble). La plej multaj tradukintoj ne povis ŝiriĝi disde la originalo kaj el tio povas nur rezulti stilo nedigestebla. Konsilo: Nepre legi multe en la originala Esperanta prozo kaj memori, ke Esperanta literatura stilo estas studebla nur el literaturaj tekstoj, ne el primovadaj gazetoj.

DRAMO ORIGINALA kaj TRADUKITA: Pri la dramo validas preskaŭ ĉio jam dirita pri la originala kaj tradukita prozo. Estis konstatite, ke en la alsenditaj verkoj ĝenerale mankas vera drameco kaj rapidaj, frapantaj, vivaj dialogoj. Aŭtoroj de dramoj klopodu ne rekte moralumi, sed prezenti dramatan historion, kiu povas kateni la atenton de la spektantoj aŭ legantoj. Ankaŭ ne malutilus iomete studi dramaturgian manlibron, ĉar la dramverkado eĉ pli ol la novelverkado havas siajn metiajn regulojn.

Finante ĉi tiun raporton mi neniel volas frapi kordojn de amaro pro gravaj mankoj konstateblaj en la ĉi-jaraj Konkursoj, precipe en la teatraĵa kaj proza branĉoj. Kontraŭe, ŝajnas al mi, ke pli da pozitivaj trajtoj estas konstateblaj nun ol ofte antaŭe; ĉiuj premioj estis aljuĝitaj en la poeziaj branĉoj (nur du triaj premioj lastjare), kaj eĉ la tradukita prozo ricevis siajn premiojn. Eble tial estas pravigebla aserti, ke ni ekeniris denove pli bonan periodon, kiu revalorigos la Belartajn Konkursojn kiel unu el la plej gravaj kulturaj institucioj de la Esperanto-Movado. Ni esperu, ke la belarta kampo trapasis sian krizon, ĉar ni ja denove bezonas riĉan rikolton por la bono kaj prospero de nia kulturo.

Baldur Ragnarsson



FOTO-KONKURSO

Kvankam la branĉo Fotografio en la kadro de la Belartaj Konkursoj 1975 estis anoncita relative malfrue, en Kopenhagon alvenis ĉ. 50 fotografiaĵoj el 8 diversaj landoj. Laŭ aparta komisiono (Vilho Setälä kaj Torben Kehlet), neniu el la konkursaĵoj kontentigis kriteriojn por la Unua Premio, la Duan Premion gajnis Zoltán Fejér (Hungario) por la fotografiaĵoj "Verda Stelo" (v. ĉi tie maldekstre) kaj "Ili estis soldatoj", dum la Tria Premio iris al f-ino Raymonde Pérault (Francio) por la fotografiaĵo "Familia promenado".

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO:

Vigla interesiĝo

EN LA KADRO de la jam tradicia Internacia Somera Universitato la kongresanoj povis aŭskulti 8 prelegojn, kiuj kovris diversajn terenojn de lingvistiko, literaturo, naturscienco, edukado kaj la problemaro de virinoj. Kiel la aliaj kunvenoj de ĉi tiu kongreso, ankaŭ ISU ĝuis viglan interesiĝon flanke de la kongresanoj. Tio montriĝis ne nur en la nombro de la ĉeestantoj (40 -- 300 en ĉiu prelego) sed ankaŭ en la pozitiva partopreno en la postprelegaj diskutoj kaj en la seminarioj gvidataj de la prelegintoj.

Aparte menciindan signifon havas ia du prelegoj, kiuj rilatis al la ĉeftemo de la kongreso "La socia pozicio de la virino". En sia prelego "Partopreno de virinoj en la ekonomio" d-ro W. Bormann atentigis, ke la statistikoj pri la ekonomiaj taskoj ne enkalkulas la laboron faritan senpage de dommastrinoj. Kvankam en la orienteŭropaj landoj 45% de la virinoj havas profesion laboron, kompare kun 30% en la okcidenta kaj 20% en la suda Eŭropo, la partopreno de virinoj en la ekonomio ankoraŭ limiĝas je malaltrangaj laboroj. Ankaŭ Boĵidar Leonov montris per abundaj statistikaĵoj la diferencojn inter la diversaj landoj rilate al la partopreno de virinoj en la diversaj kampoj de scienco kaj tekniko. La faktoj pravas la egalkapablecon de virinoj kompare kun viroj, sed kiel rimarkigis d-ro Bormann, la neevitebla biologia tasko ankoraŭ ĉiam restos forta baro kontraŭ la plena egalrajteco.

D-ro Tonkin pritraktis la temon "Utopio kaj literaturo", kaj per analizo de diversaj ekzemplaj verkoj

montris, ke tiu ideo havas tri aspektojn: satiro, konkretigo de filozofia demando, kaj utopia desegno de la futura vivmedio. La historio — la evoluo de la socio — prezentiĝas kiel peza balasto por utopiismo. La preleganto akcentis, ke kvankam Esperanto enhavas la ideon utopiismo, Zamenhof tamen konsciis "historion" kaj konstruis Esperanton sur la kultura bazo.

La inaŭgura prelego de prof. Neergaard temis pri la aktualaj lingvo-problemoj en la evoluantaj landoj. Tie, ofte konkurencas la principo de lingvo-unueco kun tiu de lingvo-egaleco. Michel Duc Goninaz atentigis pri la terminologiaj malfacilaĵoj en la pristudo de la rilatoj inter lingvo kaj ties uzantoj, kaj ankaŭ pri la nekapablo de la ŝtatoj en la solvado de la lingva problemo. Kiel solvojn proponitajn li menciis etnismon kaj esperantismon de Zamenhof-Lanti-Lapenna. Per lumbildoj kaj filmo Bruce Sherwood vigle prezentis la ĝisnunajn atingojn de la "Edukado per komputiloj". Judy Sherwood raportis pri interesa apliko de la sistemo al komunikado. Kiel la preleganto mem menciis en la postprelegaj diskutoj, ankoraŭ restas demando — ĉu efektive tiu ĉi moderna sistemo plibonigos la instruadon.

La du natursciencaj prelegoj temis pri biologio kaj kemio. "La natura ekonomio de la maro" de prof. Støp-Bowitz invitis la aŭskultantojn al la mistera mondo de la marprofundo kaj prezentis la interesan mekanismon, kiu regas la vivadon de grandaj kaj malgrandaj marestaĵoj. Prof. Kuwahara prezentis modernajn teoriojn pri la mezuro kaj esprimo de koloroj, al kiuj li mem kontribuis. Precipe interesveka estis la influo de la koloroj al nia menso; kaj nova tekniko enkondukita por ke oni povu tre facile elekti taŭgan koloron por konstruaĵo, ĉambro-intereno ktp.

Gaku Konisi

Kiel oni epitetas la 60an UK?

Grava trajto de la Solena Fermo estis la nekutime granda nombro de ĉeestantoj, ĉar ĝin partoprenis nur iom malpli da homoj ol estis en la inaŭgura solenaĵo. Tio sendube spegulas la ĝeneralan etoson, kiu regis dum la tuta Kongreso, kaj efektivan interesigon de ĉiu unuopa kongresano pri ĉiuj laboroj kaj aspektoj de la 60a Universala Kongreso de Esperanto.

LAŬ LA TRADICIA TAGORDO, en la Solena Fermo unue parolis la prezidanto de UEA, kiu salutis la ĉeestantan reprezentanton de la Ambasado de FR Germanio (gazetara ataŝeo, s-ro Doze) kaj informis pri salutleteroj kaj telegramoj alvenintaj dum la kongresa semajno. Tiuj salutoj venis i.a. de d-ro Rudolf Kirchschlager, prezidanto de Aŭstrio, Kuba Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago. D-ro Tonkin aparte menciis la leteron de ing. Ludoviko Zaleski-Zamenhof kaj legis parton el tiu letero, en kiu la nepo de d-ro Zamenhof esprimis bedaŭron, ke li ne povis akcepti la inviton ĉeesti la jubilean UK kaj sendis korajn bondezirojn al la tuta kongresanaro. Poste la ĝenerala sekretario de UEA, s-ro E.L.M. Wensing, faris tre ampleksan raporton pri la kongresaj laboroj, kaj la vicprezidanto d-ro Bormann prezentis du kongresajn resoluciojn.


D-ro Tonkin invitis la ĉeestantojn aparte saluti la kongresanojn, kiuj partoprenis la 17an UK en Ĝenevo antaŭ 50 jaroj. Montriĝis, ke en la salono ĉeestis minimume ses tiaj veteranoj. Tio enkondukis alian solenaneron en la tagordo — la proklamon de la novaj honoraj membroj de UEA. Laŭ propono de la Estraro, la Komitato de UEA en Kopenhago unuanime elektis sep novajn honorajn membrojn de la Asocio: A.D. Atanasov (Bulgario), R. Bugge-Paulsen (Norvegio), E. Dahl (Svedio), H. Dresen (Soveta Unio), M. Haudebine (Francio), M. Starr (Usono) kaj M. Sygnarski (Pollando). Kune kun la jama honora membro Vilho Setälä, la ĉeestantaj novaj honoraj membroj (Atanasov, Bugge-Paulsen, Dahl kaj Haudebine) estis invititaj al la podio por ricevi simbolan librodonacon.

Post la raporto pri la Belartaj Konkursoj, farita de Balduur Ragnarsson, kaj kelkaj teknikaj informoj fare de la d-ro V. Sadler, la prezidanto de UEA esprimis sincerajn dankojn al: la Alta Protektanto, Honora Komitato, dana Ministerio de Instruado (kiu subvenciis la Kongreson), urboj Frederiksberg kaj Kopenhago, ĉiuj membroj de LKK unuope (LKK-aninoj ricevis robukedojn), rektoro kaj prelegantoj de ISU, gvidantoj de la kunsidoj, aktoroj kaj kunlaborantoj en la artaj aranĝoj, kongresejo kaj ĝia personaro. Sekvis kelkaj dankaj kaj adiaŭaj vortoj de s-ro Kühlmann, prezidanto de LKK, kaj la tradicia transdono de la granda kongresa flago fare de s-ro Kühlmann al s-ro G. Mi-

ggas, prezidanto de la LKK de la 61a UK, kiu kore invitis ĉiujn al la venontjara kongreso en Ateno.

Prenante la parolon denove en la fino de la ferma solenaĵo, la prezidanto de UEA unue anoncis, ke la estraro de EKI (Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio), en sia kunsido dum la kongresa semajno, decidis kontribui al la nove lanĉita Financa Programo de la Esperanto-Movado per la sumo de 6 000,- guldenoj. D-ro Tonkin plue diris:

”Fariĝis sufiĉe mode lastatempe demandi kion pensos la historiistoj pri tiu aŭ alia evento. Mi demandas min kiel efektive oni epitetos la nunan Kongreson. Eble oni nomos ĝin ’la suna kongreso’, ĉar la suno sufiĉe ofte brilis eĉ en la malseka Kopenhago; eble oni nomos ĝin ’la amika kongreso’, ĉar al mi ŝajnas, ke en tiu ĉi Kongreso estas efektive atmosfero de amikeco: la homoj bone traktas unu la alian kaj la homoj ĝojas esti



A.D. Atanasov



R. Bugge-Paulsen

Novaj honoraj membroj de UEA

ATANAS D. ATANASOV (Bulgario) nask. en 1892; lernis Esperanton en 1909; aŭtoro de pluraj lernolibroj kaj multaj tradukoj el la bulgara; instruis Esperanton en la Univ. de Sofio; vicprez. de la Akademio de Esperanto. **ROLF E. BUGGE-PAULSEN** (Norvegio) nask. en 1894; lernis Esp. en 1907; estis membro de la Lingva Komi-



Organizi la jubilean Kongreson en malpli ol unu jaro estis pli ol malfacila tasko, sed Gustav Kühlmann (sur la foto) kaj liaj kunlaborantoj heroe plenumis la grandegan laboron.

ĉi tie, ili tiel ĝojas esti ĉi tie, ke eble la historiistoj nomos la 60an UK 'la longdaŭra kongreso', ĉar multaj homoj venis jam vendredon kaj mi konstatas, ke multaj ankoraŭ ne foriris. Eble oni nomos ĝin 'la harmonia kongreso'. Tiurilate mi menci, ke kvankam regas harmonio ĉi tie en niaj rondoj, ankoraŭ restas kelkaj homoj, kiuj estas kvazaŭ ekster tiuj rondoj. En la Komitato ni akceptis rezolucion, laŭ kiu oni etendas la manon al ĉiuj esperantistoj por kunlabori kun UEA. Ni etendas la manon por reakcepti ĉiujn en UEA tiam,

kiam la tempo taŭgos por ili. (*Aplaŭdo*). Kaj mi kun granda sincero alvokas al tiuj homoj reveni en niajn vicojn. Ni bonvenigos ilin, absolute bonvenigos ilin, ĉar, cetere, — kiel mi diris plurfoje antaŭe — ni ne povas ĝui la lukson de internaj bataloj, ĉar estas tro grava la laboro kiun ni devas fari. (*Aplaŭdo*). Eble oni nomos ĉi tiun Kongreson 'la labora kongreso'. S-ro Wensing raportis al vi pri la kunsidoj de la Komitato; ankaŭ ili longe daŭris, sed ili estis — se mi rajtas tion diri — nekutime fruktodonaj. Fine, eble oni nomos la nunan Kongreson 'la refortiga kongreso', ĉar ofte oni venas al kongreso kun iom da kuraĝo, kaj foriras kun iom da laco. Multaj el ni venis al la nuna Kongreso kun duboj. Ni fakte regajnis nian fortecon, ni regajnis nian celkonscion kaj ni konas la vojon, kiun ni devas sekvi. (*Aplaŭdo*). Mi petas, ke vi ĉiuj reiru hejmen kun novaj fortoj, ke vi raportu al viaj kolegoj kaj amikoj, ke vi raportu la veron pri la nuna Kongreso, ĉar nur per la vero oni povas esti juĝata.

Kaj, fine, mi diras: Dankon! Mi ne diras dankon al vi, mi diras dankon por vi. Ĉar, finfine, ni ĉiuj devas danki unu al la alia pro la atmosfero de la nuna Kongreso, pro la laboro farita en la Kongreso kaj ankaŭ pro la planoj por la estonteco. Ne estas tiel, ke unu elemento dankas al la cetero, sed estas tiel, ke ni ĉiuj dankas unu la alian, ĉar finfine ĉiuj ni konsistigas la Movadon kaj kune laboras por la sama celo. Tiu celo estas glora kaj nobla kaj necesa por la homaro."

Ankaŭ la Solena Fermo de la 60a UK finiĝis per komuna kantado de la Himno, kun admirinda vervo de s-ro Dahl, kiu gvidkantis ĉe la mikrofono.



Einar Dahl



Hilda Dresen




M. Haudebine



Mark Starr

M. Sygnarski

tato; akademiano; 40 jarojn komitatano de UEA; honora prez. de Norvega E-Ligo. **EINAR DAHL** (Svedio) nask. en 1904; lernis Esp. en 1921; multjara deputito en la Sveda Parlamento, kie li forte pledis por Esperanto. **HILDA DRESEN** (Soveta Unio) nask. en 1896; lernis Esp. en 1913; brila tradukanto kaj elstara poetino en Esperanto. **MADELEINE HAUDEBINE** (Francio) nask. en 1898; lernis Esp. en 1932; ekde tiam Cseh-metoda instruistino en multaj landoj, interalie en Hinda Unio dum 15 jaroj. **MARK STARR** (Usono) nask. en 1894; lernis Esp. en 1908; elstara aktivulo en la laborista Esperanto-movado; multe verkis nacilingve pri Esperanto; reprezentas UEA ĉe la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. **MIECZYSLAW SYGNARSKI** (Pollando) nask. en 1890; lernis Esp. en 1920; lektoro de Esperanto en la Univ. de Krakovo; aŭtoro de 9 E-lernolibroj.



TEATRAJ VESPEROJ:

Bonkvalita spektaklo

LA ELEKTO de Bulgara Esperanto-Teatro ŝajne respondas al konstanta tendenco prezenti al la publiko de la Universalaj Kongresoj facilajn komediojn, kiuj senpene akiras la favoron de tre heterogena publiko. La itala aŭ italeska komedio liveras por tio taŭgan repertuaron (oni memoru la emon por la **Commedia dell'arte** de la iama gvidanto de IAT, Srdjan Flego).

En la *Servisto de du mastroj* de Carlo Goldoni ni retrovas la klasikajn, eĉ gurditajn, elementojn de la similaj komedioj: amaj intrigoj, serio da trompoj kaj eraroj, virino sub vira vesto kaj, kulmino de l'artifikaĵoj: Trufaldino, servisto samtempa de du mastroj, aŭ, pli precize unu mastro kaj unu mastrino. La fino kunigas tri feliĉajn parojn. Se "la amo estas nevenkebla", kiel asertas la prezento de la teatraĵo fare de BET, tio estas dank' al la multnombraj artifikaĵoj de la aŭtoro.

La trupo de BET, sub la gvidado de Kiril Draĵev kaj la reĝisorado de Miroslav Mindov, sukcesis akceptigi al ni tiun ĉi facilan petolaĵon, ĉefe dank' al la brila interpretado de Peter Vuĉkov, en la rolo de Trufaldino, la trompema, elturniĝema kaj nesatig-ebla servisto. Lia mimiko, liaj akrobatecaj gestado kaj parolfluo tenas nian intereson kaptita. La aliaj geaktoroj ankaŭ majstras siajn rolojn, ĉefe P. Vasilev, kvankam lia rolo de gastejestro estas duaranga. Oni povas bedaŭri la troan sekecon de Anani Javaŝev (Florindo) kaj la superfluan ridindecon, kiun D. Stefanov atribuas al la figuro de Silvio. Aliflanke, la tuta trupo traktis tro serioze la artifikan kaj konvencian finon. Unu teknika manko: la aŭdon de la paroloj foje ĝenis tro laŭta muziko.

Entute, bonkvalita spektaklo, kiun la ĉeestantoj renkontis kun meritita aplaŭdado.

Michel Duc Goninaz

Vespero kun du artistoj

KOMPRENINTE, ke la manpleno da informaj kaj reklamaj filmoj, kiujn oni ĉiujare prezentas dum la kongresoj, efektive ne meritas okupi unu tutan vesperon de la kongresa semajno kaj, aliflanke, ne donante apartan vesperon al la ekskluzive junularaj arangoj, oni trovis ĉi-jare lokon ne nur por libera vespero (tamen kun senpaga enirebleco por la fama kopenhaga amuzejo Tivoli) sed ankaŭ por plia teatra

Dekstre: Jadwiga Gibczyńska en du kongresaj vesperoj pruvis, ke ŝi estas unu el la plej bonaj aktoroj viditaj en la ĝisnunaj Universalaj Kongresoj.

Sube: La hungara artisto Roberto Bánky kun siaj "aktoroj".



vespero. La programon de tiu vespero (la 30an de julio) plenumis nur du artistoj: Roberto Bánky de la Hungara Ŝtata Pupteatro kaj la pola aktorino Jadwiga Gibczyńska.

"Pupcirko" estis la titolo de la programo de Roberto Bánky. Ĝi konsistis el dudeko da memstaraj pecoj en preskaŭ ĉiuj teknikoj de la pupteatro. Dum unu horo kaj dudek minutoj Bánky montris, ke li bone regas sian arton kaj, ke tiu arto kapablas kateni ankaŭ la intereson de la plenkreskuloj. Aparte sukcesaj programeroj estis: la pezlevisto, virkoka batalo, toreodoro, papago kaj televido. La satira elemento en la kelkaj programeroj, kies komentoj enhavis tian trajton, povis esti iom pli klara, eble pli forta. Krome, ne estis necesa la fina senmaskigo de la ĉefpupo, ĉar tio detruis iluziojn; cetere, ankaŭ al infanoj oni ne diras, ke fabeloj rakontas fantaziaĵojn.

"Marie Curie" estas unupersona teatraĵo pri la fama sciencistino, kiun prezentis Jadwiga Gibczyńska. La aktorino mem klopodis kunmeti la teatraĵon uzante diversajn materialojn (aŭtobiografio de la sciencistino, ŝiaj korespondado kaj memuaroj, biografia romano de ŝia filino Eva), kiujn kunhelpis traduki S. Świstak. Estis nobla ideo omaĝi la grandan sciencistinon dum la Internacia Jaro de la Virino kaj Gibczyńska plejparte sukcesis en tio. Ŝi denove brilis kiel aktorino, sed oni sentis, ke la kunmeto de la fragmentoj, el kiuj konsistis la teatraĵo, ne estis la plej trafa. Ankaŭ la reĝisoraj ideoj estis iom tro ambiciaj postulante de la aktorino roli inter sep mikrofonoj, kiuj — kompreneble — ne ĉiam ekfunkciis en la ĝusta momento.

Triumfo de J. Gibczyńska

KVANKAM konstanta ero en la programoj, la kongreslanda vespero ĉiam estas refreŝige nova kaj plej ofte memorinda, Kopenhago ne estis escepto tiurilate, ĉar la Dana Vespero, okazinta la 29an de julio, viciĝis inter la plej sukcesajn aranĝojn de la 60a UK. Ĉi tiu iom laciĝe longa mozaiko de malkoheraj pecoj konsistis el altnivele prezentitaj programeroj de instrumenta muziko, solkantado, monologo, baledo, monodramo kaj folkloraj dancoj kaj kantoj. La Trio de Erik Brems prezentiĝis per agrable aŭskulteblaj pecoj de la iom lerneja germana komponisto F. Kuhlau el la pasinta jarcento. La voĉo de Karen Laugesen (i.a. kantoj de N.P. Hillebrandt kaj T. Kingo) montriĝis belsona kaj potenca, kvankam ankaŭ en ŝia kazo — tiel ofta fenomeno ĉe la interpretantoj de la klasikaj kantoj — estis malfacile diveni en kiu lingvo oni kantas.

Jadwiga Gibczyńska, pola aktorino jam konata al la kongresa publiko de Budapeŝto en 1966, gastis en la Dana Vespero per du eroj. Ŝia tributo al la centjara jubileo de H.C. Andersen — fragmento el "Galoŝoj de feliĉo" — estis bona, sed nenecese longa kaj sen finpoluro. "Vojaĝo al verdaj ombroj" de la nuntempa dana verkisto Finn Methling, kiu ĉeestis la prezenton, estis tutcerte la plej altnivela peco en la Dana Vespero. Literature sen apartaj pretendoj, kvankam interese konceptita, tiu poezia rakonto pri la homa vivo donis al Jadwiga Gibczyńska ŝancon brile pruvi, ke ŝi majstras sian arton kaj, ke ŝi estas unu el la plej bonaj

artistoj, kiuj dum la lastaj jardekoj aperis sur la scenejoj de la Universalaj Kongresoj. Kun enhavo konvena al la kongresa ĉeftemo, kun perfekta lingvaĵo kaj senmanka ritmo, tiu majeste nuancita monodramo estis prezentita perfekte. Ankaŭ la Pantomima Teatro de Tivoli per sia gaja programero gajnis amason da aplaŭdoj en la Dana Vespero. Tiu baleda peco kun Arlekeno (Vincente Gregory), Kolombina (Ida Hasselbalch) kaj Pieroto (Johan Thiersen) per sia enhavo donis la necesan tonon de leĝereco al la programo kaj per sia nivelo memorigis la spektantojn, ke Kopenhago apartenas al la mondaj metropoloj de la baleda arto.

La gronlanda kant- kaj danc-grupo MIK estis kompreneble la ĉefa ekzotikaĵo de la programo; ĝi estis bombono en la fino de la Dana Vespero. La kantoj de la okteto, kvankam iom tro artisme aranĝitaj, sonis freŝe kaj agrable. La dancoj montriĝis malpli valora parto de la grupa repertuaro, des pli, ke la koreografo pruntis iajn alpecajn aranĝojn. Programero per si mem estis la gronlandaj virinaj kostumoj, kiuj per sia harmonia bunteco incitis la scivolon de la spektantoj. Tial estas aparte bedaŭrinde, ke la priskribo de la kostumoj, samkiel la gvidado de la tuta programo, estis senenhava kaj foje eĉ banala. Ĉar similaj eraroj ne estas maloftaj en la Universalaj Kongresoj, necesas memorigi la estontajn organizantojn, ke la programgvidado estas aparta fako kaj siaspeca arto por kiu necesas talento, tute seriozaj preparoj kaj eĉ provludoj.

PIANKONCERTO DE DANIELLE BEGUIN:

Valora aldono en la programo

APARTE BONVENA ALDONO al la artaj aranĝoj de la 60a UK estis la fortepiana recitalo (la 29an de julio) de la svisa muzikistino Danielle Béguin. Per kelkaj taŭgaj vortoj la artistino mem prezentis ĉiun pecon de sia programo, kreante tiel malstreĉon kaj kvazaŭan etoson de improvizo, kvankam estis evidente, ke ĉio estis tre zorge kaj detale preparita.

La unua grupo de komponaĵoj — kvazaŭ uverturo — estis agrabla tributo al la kongresa lando kaj ĝiaj skandinavaj najbaroj: simplan kaj tuj alireblan melodion de la svedo Petersen sekvis "Danco de la diablo" de la norvego O. Olssen, ludita kun brila vervo, se ne kun

tuta klareco; de Finnlando denove simpla kaj trankvila lulkanto de Sibelius kondukis nin al Danlando mem, kiun reprezentis "La turbo", brila peceto de Nielsen, ludita ankaŭ dum la Inaŭguro.

La ĉefverkoj en la programo estis la unua Partito de J.S. Bach kaj la Rondo en formo de mazurko de F. Chopin. Malgraŭ la multaj belaj momentoj en la interpreto de la verko de Bach — speciale la delikate nuancitaj kontrastoj en la sarabando kaj menuetoj — estis la prezento de la verko de Chopin tiu, kiu postlasis la plej profundan kaj kontentigan impreson. Per ĉi tiu verko la pianistino montris sian efektivan nivelon kaj oni sentis, ke ŝi en ĝia interpreto estas "hejme". La programon finis tiu konata pianista batalo, "La Campanella" de F. Liszt, ludita delikate kaj brile, kvankam ne kun plena certeco.

Du aferoj iom malhelpis la etoson de la tuta aranĝo: unue, la fortepiano ne estis tiel bona kiel meritas altnivela muzika prezento kaj, due, daŭra enirado de la malfruintoj estis ĝena por la publiko kaj malĝentila rilate la artistinon.

D.G.H.

De Skandinavio ĝis Sud-Ameriko

KIAM ONI PLANAS kongresajn programojn, apenaŭ eblas antaŭvidi aranĝojn, kiuj kun certeco plaĉos al ĉiuj partoprenantoj de UK. Tamen, planante la t.n. tutkongresajn vesperajn programojn oni klopodas proksimiĝi al la intereso de plimulto de la kongresa publiko. La Internacia Arta Vespero jam dum jaroj kontentigas tiun kriterion zorgante samtempe pri la necesa arta nivelo de siaj programoj.

La kopenhaga IAV estis konceptita simile al la samnoma aranĝo en la pasintjara UK: ĝi do estis koncerto ilustranta la atingojn de la Esperanta kulturo sur la kampo de muziko. Krome, oni bonvolu nepre atenti la fakton, ke ĉiuj artistoj en tiu programo estis ne eksteruloj, kiuj lernis siajn rolojn en la programo, sed homoj, kiuj posedas la Internacian Lingvon kaj aktivas en la Esperanto-movado.

En la unua parto de la programo aperis denove Maria Angelova kaj Veselin Damjanov, profesiaj kantistoj el Sofio. Ambaŭ jam bone konataj al la kongresa publiko, ili en Kopenhago prezentis novan programon: Angelova per sia rava voĉo interpretis ariojn de Purcell, Bellini kaj Stravinski, dum Damjanov bone prezentiĝis per romanco de Martini, kanto de Musorgski kaj du propraj kantetoj laŭ la tekstoj de I. Rudnikov kaj R. Grinșpan. Angelova kaj Damjanov prezentis kune dueton el *Magia fluto* de W.A. Mozart tiel, ke ĝi fariĝis unu el la plej brilaj programeroj de la vespero. La kantadon de Angelova kaj Damjanov akompanis la fama dana pianistino Ester Vagning, kies afabla kunlaborpreteco grave kontribuis al la sukceso de ĉi tiu kongresa aranĝo.

La brita kantistino Margaret Hill, helpe de siaj edzo David kaj filino Catharine, prezentis bukedon da popolkantoj (irlandaj, skota kaj angla) kaj unu sian propran komponaĵon. Per sia bela voĉo, tre rafinita gusto kaj senpekaj tradukoj (plej ofte de W. Auld) Margaret Hill estis la kvalita kerno de la tuta vespero. Estas tempo noti, ke la muzika aktiveco de Margaret Hill jam kreis novajn pli altajn kriteriojn, kiujn devos atenti ĉiuj aktivantoj sur la muzika kampo en la Movado. Ŝia senakompana interpreto de la irlanda kanto "Tra la tuta foir" estis la perlo de la vespero.

La svisa muzikistino Danielle Béguin estis tamen la ĉefa malkovro de la artaj aranĝoj en la 60a UK. Tiu ne facile bridebla, malkonvencia talentulino pli ol plenigis la tutan duan parton de la vespero kaj longigis ĝin je troa duonhoro. Estante mem vagabonda kaj fierante pri tio, Danielle promenis la publikon de Skandinavio ĝis Sud-Ameriko ludante tutan aron da instrumentoj (gitaro, mandolino, akordiono, tuta

fasko da flutoj, fortepiano). Sian prezentadon ŝi akompanis per ĉarmaj poeziecaj komentoj, enhave bonaj sed lingve ne tute kompetentaj. Tamen, la tuto havis iom da cirka elemento kaj pli similis al bona muzika leciono ol al koncerta programero. Ĉiukaze, pri Danielle Béguin necesas kalkuli ankaŭ dum la estontaj kongresoj, kondiĉe, ke ŝiaj vagadplanoj inkluzivos niajn kongresurbojn. Eĉ se ŝiaj estontaj programoj restos improvizitaj — tio cetere estas unu el iliaj valoraj trajtoj — iom da reĝisora tuŝo tute ne ĝenus kaj eĉ povus emfazi la spontanecon de la arto de Danielle Béguin.

La programon tre kompetente gvidis Eliza Kehlet, kiu el siaj prezentotekstoj faris aparte atentindan eron de la Internacia Arta Vespero en Kopenhago.



Kvankam Danielle Béguin jam tutan jardekon estas dumviva membro de UEA, oni malkovris ŝin nur en Kopenhago, kie ŝi internaciigis la Internacian Artan Vesperon.

Aparta Junulara Tago – ĉu konvena?

ESTAS NATURA AFERO, ke ĉiujare partoprenas granda nombro da junaj personoj en la Universala Kongreso, do estas ankaŭ natura afero, ke estu en la programo io por ili. Tio estas des pli grava ĉar ĉiam aperas ankaŭ gejunuloj, kiuj pro iaj kaŭzoj ne partoprenas en la Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

Tamen, ĉi-jare denove evidentiĝis, ke la Junulara Tago estas unu el la problemaj punktoj en la kongresa programo. Unue estas la problemo de kunlaboro inter TEJO kaj LKK pri la aranĝo, kaj due – pli grave – la demando pri la ĝustaj funkcio kaj utilo de tiu tago.

La Junularan Tagon en Kopenhago konsistigis kvar aranĝoj: publika kunveno de TEJO, komuna junulara lunĉo, io nomita en la Kongresa Libro "administra kunveno" de TEJO, kaj "junulara vespero". Ni komencu per la matena "publika" kunveno, kiu ŝajne havas duoblan rolon: kunvenigi gejunulojn por diskuti inter si, sed ankaŭ prezenti la agadon de la junularo al ĉiuj aliaj, kiuj interesiĝas aŭ kiuj volus demandi kaj kritiki.

La unua parto de la kunsido temis pri la ĝenerala agado de TEJO; la ĝenerala sekretario de TEJO, Brunetto Casini, skizis la agadon; sekvis diskuto, el kiu kelkaj punktoj estas menciindaj. Tre ĝenerala problemo estis tuŝita, kiam oni parolis pri la varbado inter la junularo fare de lokaj grupoj, precipe kiam loka grupo mem ne havas junajn membrojn – kaj tiaj kazoj bedaŭrinde ne estas maloftaj. Ja ne estas apartaĵo de Esperanto, ke oni malfacile varbas junajn personojn por afero pri kiu surloke sin okupas nur maljunuloj, kaj oni devas trovi formojn de kunlaboro por forigi tiun malfacilaĵon. Alia grava problemo, pri kiu atentigis en la kunveno du reprezentantinoj de la koncerna aĝgrupo, estas la manko de taŭgaj aranĝoj esperantistaj por gejunuloj ĉirkaŭ 14-jaraj, kiuj ĝenerale ankoraŭ sentas sin tro junaj por la kongresoj kaj aliaj aranĝoj de TEJO kaj ĝiaj sekcioj, kie la meza aĝo estas pli proksima al 20. Sume do tiu parto de la kunveno estis ĝenerala forumo pri problemoj de la Esperanto-movado. Utilos ankoraŭ aldoni unu menciitan punkton el la diskuto: por varbi inter gejunuloj pli necesas emfazi temojn ĝenerale interesajn kaj konatajn, kiel vojaĝadon kaj interamikiĝon per Esperanto, ol rekte elmeti Esperanton kiel idealan aferon.

Tio kondukas nin al la dua parto de la kunveno, en kiu oni diskutis la laboron de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO, kiu ĝuste celas tian nerektan laboron por Esperanto, klopodante en siaj rilatoj kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj unuavice krei pli bonan konscion pri la diversaj aspektoj de la lingvo-

problemo en la mondo. En la diskutado pri tiu laboro la ĉefa punkto estis zorgoj pri la neŭtraleco de TEJO en ĝiaj eksteraj rilatoj; por la estraro de TEJO tiu neŭtraleco estas ekster ĉia dubo, ĉar oni klare distingas inter kunlaboro kaj implikiĝo en la politikaj aferoj de aliaj organizaĵoj.

La publika kunveno estis iom tro ambicie lokita en la sama salono kiel la ĝeneralaj kunvenoj de UEA, kio ja ne helpis diskutadon. Oni devis atendi la komunan lunĉon por trovi alian etoson sen podioj kaj mikrofonoj. Ĝi enviciĝis inter tiuj aranĝoj, kiujn oni agrable memoras, kvankam ĝi estis minimume aranĝita. Kvindeko da junaj personoj kolektiĝis neformale en subĉiel-restoracio-trinkejo, kie ankaŭ eblis aĉeti trinkaĵojn kaj alporti proprajn manĝaĵojn – grava avantaĝo por multaj en lando de timigaj prezoj. Tie do kreiĝis taŭga etoso inter gejunuloj, kiuj cetere dum la kongresa semajno ne multe estis kune. . . , tiel taŭga etoso efektive, ke la antaŭvidita postlunĉa kunveno nur malfrue komenciĝis.

Kulmino de la Junulara Tago devus esti la Junulara Vespero, kiun oni ŝatus vere kompreni kiel junularan balon – aŭ eble iam TEJO volus havi alispecan distraĵon. Ĉiukaze gravas, ke jen estas aranĝo, kie la junaj kongresanoj povas distriĝi laŭ sia gusto. Do iusence prave oni antaŭvidis en Kopenhago, ke la Junulara Vespero estu paralela kun la spektaklo por homoj ne plu tiel junaj – la Dana Vespero. Bedaŭrinde, ne tute tiel okazis, ĉar preskaŭ tute ne okazis io. Tie plej evidente mankis la necesa kontakto inter TEJO kaj LKK, ĉar oni ne sciis antaŭ la komenco de la afero, kio entute estas antaŭvidita. Komence ŝajnis, ke nenio estas planita, ĉar la salono restis fortrese fermita, dum apude la pordoj de la salono "Zamenhof" estis larĝe malfermitaj por la Dana Vespero, – do en tiun faŭkon malaperis multaj, kiuj alikaze estus en la junulara aranĝo. Kaj efektive por tiuj, kiuj persisteme atendis la malfermon de la pordo, ne sekvis tre memorinda vespero; la restoracio de la kongresejo estis aliigita nur per formeto de kelkaj tabloj kaj instalo de elektra orgeno. Eĉ peto pri malfortigo de la lumo ricevis komence nur respondon, ke "tamen ne estas diskoteko". Tio ankoraŭ ne signifus komplete malbonan etoson, sed bedaŭrinde la orgenisto tro kutimiĝis al muzikumado en lokoj, kie oni ne aŭskultas la muzikon, kaj do apenaŭ kapablis vigliĝi. La partoprenintoj ŝuldas grandan dankon al Roland von Malmberg, kiu dum parto de la vespero ludis sian gitaron, kantis kaj kantigis. Post tiu kontribuo ankaŭ la orgenisto montris sin iom pli verva.

Ŝajnas do, ke la aranĝoj por la junularo en UK povus esti pli taŭgaj ol ĉi-jare, kaj oni povus demandi sin, ĉu aparta junulara tago estas konvena formo por tiuj aranĝoj. Aliflanke povus esti interese havi parton de la programo, ĉu dum unu tago, ĉu tra la tuta semajno, aparte por junaj personoj. Kunveno en kiu oni ĝenerale diskutas, kun gejunuloj kaj pliaĝuloj, problemojn de la Movado, ne apartenas al tia specife junulara programo.

Brian Moon

Fredericia kaj interŝanĝoj

DANUJO gastigis la 31an IJK, kvankam nur antaŭ tri jaroj la dana sekcio venis al TEJO kaj estas ankoraŭ ne tro granda. Fredericio, la urbo kie ni kongresis, tute ne havis junajn esperantistojn ĝis ĉi-jare vekigis intereso, interalie pro la Kongreso. Tamen, oni sukcesis el aliaj lokoj organizi la Kongreson en Fredericio. Oni trovis tre belan ejon, kiu fakte estas sportejo kun granda halego kaj kelkaj konferencaj ĉambroj.

Kiu memoras la longajn vojojn de Münster, tiu certe ĝuis en Fredericio la mallongan vojon al la dormejo, situanta je nur 200-metra distanco de la kongresejo. Interne oni estis akceptata de fervoraj deĵorantoj inter stokoj da litotukoj kaj lankovriloj kaj fruaj alvenintoj vidis ŝvitantajn LKK-anojn, kiuj veturigis armeajn matracojn en klasĉambrojn de la dormejigita lernejo. Meznombro po 14 homoj loĝis en unu tia ĉambro, sed oni ja ne venas al kongreso por dormi, ĉu?

Tio tamen estis nur komencaj impresoj. Fakte okazis ankaŭ programo, laŭ iuj eĉ nekutime densa, eventuale eĉ riĉa. La kadra temo "Kulturaj interŝanĝoj" ampleksis multon, pri kio esperantistoj ŝatas paroli. Kulturaj interŝanĝoj ja okazas inter malsamlingvaj grupoj, ĉu nacioj, ĉu etnoj, per ĉiuj komunikiloj, sed ĉefe per lingvo. Skribante pri tio, ke Esperanto povus roli kiel plifaciliganto ĝuste ankaŭ de kulturaj interŝanĝoj, la alta protektanto de la Kongreso, la kulturministro de Danujo Niels Matthiasen certe ne nur esprimis teorion fakton, sed priskribis ekzakte tion, kio la Kongreso estis mem: interŝanĝejo por opinioj, ideoj kaj nelaste kulturo. La partoprenantoj praktikis ĉefe du specojn de interŝanĝo: unudirektan en prelegoj, kaj multdirektan en laborgrupoj kaj diskutoj. Preskaŭ ĉiam okazis io en ĉiuj kvin salonoj de la kongresejo kaj parte eĉ ekstere en la bela vetero, kiun la LKK mendis por la Kongreso.

Parolante pri kulturaj interŝanĝoj uzante Esperanton oni facile alvenas la demandon, ĉu efektive la ofte menciata "Esperanto-kulturo", se ĝi fakte ekzistas, estas rezulto de tiuj kulturaj interŝanĝoj inter la kulturoj el kiuj la esperantistoj devenas kaj en kiuj ili vivas. Tiun temon tuŝis la prelego de Humphrey Tonkin, kaj li ankaŭ jam aludis tiajn problemojn dum sia inaŭgura parolado.

Jes, inaŭguro kompreneble okazis, kun la sama seka enhavo kiel ĉiam, sed ĉi-jare la etoson savis norvega orkestro, kiu hazarde estis en la urbo kaj rikoltis tondran aplaŭdon. Dum la inaŭguro la prezidantino de TEJO, Flora Szabó-Felső, voĉlegis ankaŭ la liston de landoj el kiuj aliĝis kongresanoj; temis pri ĉ. 265 aliĝintoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, krome el Meksikio kaj Usono, Japanujo kaj Israelo, el Maroko kaj Burundio, kaj ankaŭ la ĉiukongresa maŭriciano ne mankis. Aparte abundis meksikianoj kaj japanoj. En-

tute la plej multaj denove estis la jugoslavo, kiuj venis kiel la pasintan jaron per propra aŭtobuso.

Sed oni ne nur interŝanĝis, oni ankaŭ aŭskultis. S-ino Haudebine prelegis pri Hindujo kaj vekis multe da intereso per sia ekspozicio, kiun ŝi kunportis en peza valizo. Ŝi montris teksaĵojn, bildojn, ornamaĵojn, librojn kaj figurojn el Hindujo kaj eĉ kreis ekzotikan odoron en la ekspoziciejo per iuj brulantaj fumiloj.

Dirk Willkommen el FRG prelegis pri Feroaj Insuloj, pri kiuj verŝajne multaj unuafoje aŭdis. En ambaŭ prelegoj oni sentis, ke la parolantoj havis personajn spertojn pri sia temo, ne nur ellibran scion.

Estus tro menciigi ĉiujn unuopajn erojn de la labora programo, sed eble estas interese noti, ke la japanoj vekigis el sia ofte praktikata muteco kaj faris laborgrupon en kiu ili prezentis sian landon per paroladoj kaj lumbildoj. La ĉefe eŭropa aŭskultantaro eksciis multon nesciitan kaj faris multajn demandojn en kiuj la japanaj prelegantoj certe trovis belan bukedon de antaŭjuĝoj kaj duonscioj pri sia lando.

Teme proksima al la aliaj programeroj, okazis seminario de KER dum la 31a IJK en kiu oni samtempe tradukis por esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj reprezentis kvar neesperantistajn junularajn organizaĵojn. La seminaria temo "Lingvo kaj malkoloniigo" traktis aparte tiklan kaj nuntempe aktualan parton de kulturaj interŝanĝoj, ĝuste ĉar en tiu kampo la kulturo intime interplektiĝas kun politikaj kaj potencakiraj procesoj, kiuj staras ekster la kompetenteco de TEJO. Sed oni ja ne nur laboris. Kutime vespere okazis distro, oni prezentis danan popolmuzikon, popoldancojn el la urbo Fredericio kaj fine havis la nemalhaveblan balon. Fakte la intenco kun kiu oni elektis la kongresan temon ankaŭ estis montri kulturojn ne tiel vaste konatajn, kaj ŝajnas, ke por kelkaj kongresanoj la dana popolkulturo iom trois dum la Kongreso. Sed ĉu vere oni devas dum ĉiu kongreso en ĉiu lando danci laŭ la sama muziko?

Bone, ne ĉiu kapablas danci laŭ la dana popolmuziko, sed tion oni povis lerni en aparta laborgrupo, en kiu Christian Lauridsen, dano, kaj Gunnar Farm, svedo, instruis skandinavajn popoldancojn. La grupo trovis sufiĉe grandan interesigon, kaj en unuopaj dancoj oni eĉ tiom progresis, ke eblis prezenti unu dancon kune kun la popoldancistoj, kiuj venis en belaj naciaj kostumoj por prezenti danan folkloron.

Similan praktikan kulturinterŝanĝan karakteron havis la kantgrupo, en kiu Goar Engländer el FRG kaj Ite Tytgat el Belgujo instruis internaciajn kantojn, kio signifas plejparte kantojn el diversaj landoj tradukitajn en Esperanton. Ĵaŭdon vespere ambaŭ "praktikaj" grupoj prezentis siajn kapablojn al la tuta kongresanaro.



Tamen, oni aktivis ne nur tiun vesperon sed ankaŭ la antaŭan, dum kiu sub la titolo "Vespero de malmulte konataj kulturoj" kongresanoj prezentis kantojn aŭ dancojn el siaj landoj, parte en naciaj lingvoj, kaj parte en Esperanto por kunkanti. Ni vidis svedajn dancojn, hungaran ĉardaŝon, aŭdis kantojn el Svisujo kaj Japanujo kaj povis kunkanti polajn kaj israelan kantojn kaj multajn aliajn. Antaŭ tio oni manĝis naciajn

specialaĵojn preparitajn de grupoj de kongresanoj el Jugoslavio, Japanujo, Italujo kaj aliaj landoj. Bedaŭrinde, ĉe la tablo kie oni priservis sin, mankis indikoj kio estas kio kaj de kiu lando ĝi venas. Tamen, tra la ĉambro aŭdiĝis onidiroj pri nomoj kaj devenoj de la unuopaj manĝaĵoj, kaj ankaŭ la gusto kreis surprizojn. Fine oni ekskursis al la insulo Fueno, almenaŭ duono de la kongresanaro, ĉar la buĝeto de la Kongreso ne sufiĉis por pagi la ekskurson, do oni devis mem investi iomete por vidi la urbon Odense, kiu enhavas la naskiĝdomon de la dana fabelisto H.C. Andersen kaj ankaŭ krom tio estas vidinda. La ĉefan allogon eble signifis la bierfabriko, kiun oni vizitis kaj kies produktojn oni fakkone ekzamenis. En la suda parto de la insulo oni vizitis Egeskov, kie troviĝas bela muzeo kun malnovaj aŭtomobiloj kaj flugmaŝinoj kaj eĉ pli bela renesanca palaco en samstila parko.

La 31a IJK pasis kaj ŝajnas al mi, ke ĝi sukcesis. La organizantoj ricevis mirige malmultajn plendojn kaj, se tio ne signifas rezignacion, do ĝi signifas, ke oni pretas rezigni pri iom da komforto dum unu semajno por ĝui kongreson, kiu ĉiun jaron estas malsama de la antaŭaj. Sed, ĉu la Kongreso havis rezultojn, ĉu de jaro al jaro ni progresas? Mi ne ŝatus respondi tion, sed eble vi ŝatus diskuti pri tio.

Klaus Schubert

KUNSIDOJ DE LA KOMITATO DE TEJO:

Ĝis kiu grado KER restas TEJO?

KIEL KUTIME la komitatanoj devis kunsidi kiam la resta kongresanaro amuzis sin aŭ ĉeestis distrajn programerojn. La Komitato formis komisionojn, kiuj krome kunsidis, kaj kelkaj homoj certe infektiĝis de kunsidomanio.

Oni aŭdis raporton de la Estraro pri ĝia agado kaj iom diskutis pri tio. Evidentiĝis, laŭ mia persona prijuĝo, ke la agado de TEJO konsistas ĉefe el la agado de ĝiaj landaj sekcioj, la agado de KER, la organizado de la IJK kaj la regiona agado, kiu tamen ne estas labor-kampo kie oni rapide atingas grandiozajn venkojn malgraŭ persista laboro. Kaj fakte la agado de KER kaŭzis, verŝajne unuafoje post pluraj jaroj, iom viglan diskuton en la Komitato. KER havas momente la problemon de translokiĝo, sed krom tiuj teknikaj demandoj, leviĝis ankaŭ la problemo, kiom KER ankoraŭ estas la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, kiom do ĝi reprezentas kaj prezentas la agadon de TEJO ekstere, kaj kiom ĝi jam fariĝis memstara organizaĵo sur la internacia junularorganizaĵa sceno. Kompleta apartiĝo de TEJO certe estas maldezirinda, sed, se oni volas prezenti la agadon de TEJO, kion do

oni prezentu? Tiun problemon frontos KER estonte kaj laŭ mi estus tre dezirinde, ke la Estraro kaj TEJO entute pli multe interesiĝu pri KER kaj direktu ĝian laboron.

Alia problemo levita en la Komitato estas *Kontakto*. Malnovaj membroj eble memoras, ke sub tiu titolo iam aperis revuo eldonata de TEJO. Nun ĝi havas novan ĉefredaktoron kaj aron da redaktantoj, kaj oni rajtas esperi. . . Sed, aperis jam tiom da promesoj, ke mi ne volas aldoni plian. La nova ĉefredaktoro, Valerio Ari, pseŭdonime Giorgio Silfer, ĉiukaze havas deciditan opinion pri la revuo, kaj se li sukcesos realigi siajn planojn, estus bone.

Fine oni ankaŭ decidis pri la venonta IJK: la 32a IJK okazos antaŭ la 61a UK en Ateno, nome en la urbo Tesaloniko. Jam dum la kongresoj en Fredericio kaj Kopenhago aliĝis multaj al Tesaloniko. Por 1977, kiam UEA kongresos en Rejkjaviko, oni ankoraŭ serĉas solvon.

Eble, necesas fine mencii kiuj estas la novaj estraranoj de TEJO: prezidantino: Claude Nourmont (Francujo), vicprezidantoj: Savas Tsitirides (Grekujo) kaj Klaus Schubert (FR Germanujo), financo kaj eldonaĵoj: Paul Peeraerts (Belgujo), ĝenerala sekretario: Brunetto Casini (Italujo), sekretario de KER: Ineke Emmelkamp (Nederlando), servoj kaj studenta agado: Angel Todorov (Bulgarujo), regiona agado: Juan Azcuénaga Viena (Hispanujo), Margarita Nájera (Meksikio) kaj Stefan MacGill (Nov-Zelando).

K.Sch.

Babelo à la State Department

Kiel kutime dum la lastaj jaroj, la saluto de la usona diplomato en la Inaŭguro de la 60a UK viciĝis inter la plej efektajn. La dua sekretario de la Usona Ambasadro en Kopenhago, s-ro P. Heller, salutis la Kongreson en ses lingvoj kaj klarigis, ke li parolas dane, ĉar li oficas en tiu lando, angle, ĉar tio estas lia gepatra lingvo, germane, ĉar ĝi estas la lingvo de la sudaj najbaroj de Danlando, france, ĉar tiu lingvo ankoraŭ gravas en la diplomatio, itale, ĉar li ŝatas la lingvon de Dante, kaj fine, Esperante, ĉar li tiel plej efike komunikiĝas kun la aŭskultantoj.

Horloĝo por Danielle

Kiam la organizantoj de la Kongreso demandis la svisan muzikistinon Danielle Béguin kial ŝi tiel longigis sian parton de la Internacia Arta Vesperto, ŝi tute sincermiene respondis, ke ŝi ja ne havas horloĝon, kiun oni do nepre aĉetu al ŝi, se ŝi partoprenos la programojn de la estontaj kongresoj. La malkonvencia Danielle ŝvitigis la organizantojn ankaŭ dum la inaŭgura solenaĵo, ĉar oni anoncis ŝian muzikan programon nur pro forta supozo, ke ŝi jes troviĝas en la salono, malgraŭ tio, ke ŝi nenie estis trovebla. Feliĉe, ŝi efektive ĉeestis.

Grataj rilatoj

Post la apero de nia julia/aŭgusta numero, kiu tuŝis kelkajn aspektojn de la Movado en Japanio, iu demandis konatan japanon, kiu partoprenis la Kongreson, pri la efektivaj rilatoj inter Japana Esperanto-Instituto kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj. La demandito asertis, ke la rilatoj inter JEI kaj KLEG estas "tute grataj", farante tiel unu plian ĉarman intermikson de r kaj l, ĉar li efektive celis diri, ke la rilatoj estas glataj kaj senproblemaj.

Hotelo por la kasistino

Konsciante pri la malfacileco de la kasista laboro dum la Kongreso, kaj eventuale sub influo de la Internacia Jaro de la Virino, la edzo de la kasistino de LKK, s-ino Karen Hansen, pagis por sia edzino hotelĉambron apud la kongresejo, kvankam ili ja loĝas en Kopenhago, iom for de la urbocentro.

Arlekena hurao

Unuanimeco neniam estis la plej esenca trajto de la esperantistaro. Tamen, al la rolanto de arlekeno en la Dana Vesperto sufiĉis lerni kelkajn vortojn en la Internacia Lingvo por per ili instigi la tutan kongresanaron hurai por la arlekeno. La spektantoj eĉ konsentis trifoje ripeti la huraoon ĝis la arlekeno konsentis, ke ĝi estas unuanima kaj plenvoĉa.



"Tra la mondo iras forta voko...":
Unu el la plej memorindaj aferoj en la Solena Fermo estis la emocio kun kiu Einar Dahl kantis la Himnon.

La damninda ŝtuparo

Unu el malmultaj aferoj pri kiuj malkontente grumblis multaj kongresanoj estis la ŝtuparo en la lerneja konstruaĵo apud la kongresejo, kie en la 3a kaj 4a etaĝoj situis 9 salonoj por la plimulto de la fakaj kunvenoj kaj prelegoj de ISU. La kongresanoj verŝajne estus pli volonte akceptintaj tiun devigan sportadon, se oni estus informinta ilin, ke la lernejaj salonoj estis senpage je la dispoŝo de la Kongreso.

Ripetinda eraro

Iel okazis, ke unu el la triaklasaj hoteloj, kun kiuj oni kontraktis loĝejojn malatentis ĝustatempe rezervi sufiĉe da ĉambroj en tiu hotela kategorio. Pro tio pluraj dekoj da kongresanoj subite devis loĝi en unuaklasa hotelo kontraŭ la prezo de la mendita triaklasa. Nu, kvankam oni en Kopenhago malvolonte parolis pri tio, la kongresanoj, kiujn trafis tiu plago, tute ne protestis. Kelkaj eĉ demandis, ĉu ankaŭ estonte eblos aranĝi, ke okazu similaj eraroj, des pli, se ili kiel ĉi-foje ne iras al la konto de la Kongreso.

Diplomatoj en la popolo

Pro ies malatento, post la Solena Inaŭguro oni forgesis atentigi la ĉeestintajn diplomatojn kaj aliajn honorajn gastojn pri aparta elirejo el la salonego, tiel, ke la ekscelencoj havis la honoron miksiĝi kun la popolo kaj preskaŭ batali por sia vojo al la elirpordo. Oni rimarkis, ke iuj el la honoraj gastoj estis tute sen-spertaj tiurilate.

Prezidantaj matenmanĝoj

Zorgema statistikisto sen apartaj klopodoj facile venus al konkludo, ke la plej fervora kongresano estis la prezidanto de UEA, kiu ĉeestis (almenaŭ parte) pli-malpli ĉiujn kongresajn aranĝojn. En sep kongresaj tagoj li sukcesis fari plurajn dekojn da paroladoj kaj paroladetoj, eĉ ne kalkulante tiujn, kiuj okazis en la sep komitataj kaj sep estraraj kunsidoj. Krome, ŝajnas, ke almenaŭ kelkcento da kongresanoj sukcesis renkontiĝi kun la prezidanto, kiu lanĉis novan kutimon — importitan el Usono — invitadi homojn al laboraj matenmanĝoj frue en la tago.

Virinoj en la Malfermo

El 25 aliĝintaj landaj asocioj, kiuj reprezentigis kaj salutis en la Malfermo de la Kongreso, 9 landaj asocioj por tiu tasko delegis virinojn. Ŝajnas, ke oni ankaŭ ĉi-rilate atentis la Internacian Jaron de la Virino.

Skribemaj kongresanoj

En lando kie la ĉefdelegito de UEA estas mem poŝtestro, la kongresa poŝtoŝicejo devas bone funkcii. Tiel estis en Kopenhago, kvankam la kongresanoj malfacile kutimiĝis al la laborhoroj de la poŝtoŝicejo. La poŝtistoj elkalkulis, ke la kongresanoj estis tre fervoraj, ĉar ili produktis 12 351 sendaĵojn, kiuj akiris la oficialan poŝtstampon de la Kongreso. Tamen, nur 3 kongresanoj sendis monon kaj 6 ekspedis pakaĵojn.

Dokumentujo havebla ankoraŭ

La bela dokumentujo, kiun SAS disponigis al la kongresanoj, kun la kongresa insigno, FIAT-broŝuro, turismaj prospektoj kaj aliaj interesaj dokumentoj kaj paperoj, estas havebla kontraŭ 10 respondkuponoj aŭ egalvaloro. Same restas ankoraŭ la bela afiŝo pri Kopenhago, havebla kontraŭ 3 respondkuponoj. Mendu rekte ĉe: 60a UK, Postboks 1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Ses — ok junaj fraŭlinoj (8–14 jaroj) serĉas sincerajn korespondantinojn en la tuta mondo. Se plaĉas, skribu al: s-ro E. D'Aute-Hooper, 25 Douglas Road, Acocks Green, Birmingham 27, Anglujo.

Speciala oferto. Sendu nur unu rpk. Vi ricevos *Esenco de Kvakerismo*. Bele presita. A. Leather (E), 19 Birch Drive, Silverdale, LA5 0SE, Anglujo.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1 000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financan bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 IIR, Rotterdam-3002, Nederlando.

Atentu esperantistoj, ĉie en la mondo. Gotenburgo estas la dua urbo en Svedio post Stokholmo, la ĉefurbo. Ni deziras per Esperanto efektiviĝi ĝemeliĝon kun la dua urbo en ĉiu lando. Skribu kaj petu detalojn: INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Ges-roj, li 30-jara, ŝi 22-jara, kun 2-jara filino, serĉas ges-rojn aŭ aliajn homparojn en Eŭropo kaj Kanado por korespondado kaj intervizado. Ne gravas se unu parano ne bone parolas — pli dezirinda estas bonhumora, amikeca personeco. Respondu al: Ges-roj Sheed, 9 Dale Close, Ord-sall, Retford, Notts, Anglujo.

Internacia Socia Revuo: Jarkolektojn 1907-14 deziras akiri Ulrich Lins, Gemarkenstr. 146, D-5 Köln 80.

Nova klubo kun studgrupo deziras leterojn aŭ bildkartojn: Esperanto-klubo de Tyresö, Luin, Myggdalsvägen 123, S-13500 Tyresö, Svedio.

Aŭstralio, Vic. 3149, 88 Headingley Road, s-ino Courteney, deziras korespondi kun Pariz-Aten-Madrid-Rom-anoj kaj aliaj esperantistoj loĝantaj en aliaj famaj urboj de supraj landoj.

Edit Guth, hungara lernantino, deziras korespondi kun junaj esperantistoj pri lingvoj, sporto, muziko kaj politiko. Adreso: Rákóczi út. 23/6, H-5000 Szolnok, Hungario.

Kolektanto serĉadas kaj interŝanĝas biero-subumojn bonstatajn el la tuta mondo. Mi kontraŭdonas ankaŭ p. m. Harry Borchert, Hindenburgstr. 4, D-330 Goslar 2, FR Germanio.

Kvalifikitaj flegist(in)oj por kliniko de geolduloj apud Parizo dezirataj. Skribu al: D-ro Duplan, I.M.R. "La Verrière", France 78320.

Loka grupo el la sveda pac-asocio prezentas sin en Esperanto. Petu la faldfolion ĉe TUFF, Box 58, S-13501 Tyresö.



Sen ĉi tiu libro ne eblas bone aktivi en la Esperanto-movado

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libro servo de UEA.

Tampere

*la verda fabrika urbo inter bluaj lagoj
vivas kaj diversas!
Bonvenu konstati!
Petu Esperantan informilon.*

*Informojn donas:
Turisma kaj Kongresa Oficejo de Tampere
Aleksis Kiven katu 14
33210 Tampere 21
Finnlando*

Ĉe la franca Lazura Bordo, sub sunplena ĉielo, ĉe

HOTEL MIRON ★ N.N.

4 rue Miron — NICE — tel. 93.85.22.68,

kiu jam faris la miron

de pluraj dekoj da esperantistoj,
atendas vin la esperantista familio Llorens

Lifto — Komfortaj ĉambroj kun aŭ sen duŝo —
Telefono en la ĉambroj — Televid-salono

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca
legolibro en-
havanta 20
dialogojn kun
2000 konversa-
ciaj frazoj, parol-
turnoj, demandoj
kaj respondoj kaj
kun 20 tutpaĝaj
humuraj ilustraĵoj.
La tekstoj estas laŭ-
grade aranĝitaj.



Verkita en
simpla stilo
por faciligi al
novaj lern-
antoj paroli
la Inter-
nacion
Lingvon

141 pj.
Poŝform-
ata (22 x
12 cm)



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis:
Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus
sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe
mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

*Post dujara eldonhalto, rekomencis aperi la
multfaceta revuo de CED*

la monda lingvo- problemo



socia lingvistika politika jura psikologia ekonomika

*Pro la granda malfruigo de la eldonado, la abonoj ne
plu validas por difinita jaro, sed por difinita volumo.
Unu volumo konsistas el serio de tri numeroj, po 64
paĝoj. Nun aperanta estas la volumo 5, kiu konsistas
el la numeroj 13, 14 kaj 15. N-ro 14 ĵus aperis; n-ro
15 estas enpaĝigita kaj aperos antaŭ la jarfino. Ĉiu
abonanto, kiu bezonos rekotizi por la volumo 6,
aŭtomate ricevos avizon pri tio. Jam kompostataj
estas la unuaj numeroj de la volumo 6: n-roj 16 kaj
17, tiel ke la estonta eldonritmo estos multe pli vigla.
Jen la enhavo de la ĵus aperinta numero:*

Vol. 5, n-ro 14

Erik v. HERTZEN, De la situation linguistique des
Lapons

Tazio CARLEVARO, I giurassiani svizzeri: una
minoranza in lotta

Charles CASTONGUAY, L'assimilation des franco-
phones dans la région de Montréal

Probal DASGUPTA, A Note on Stylistic Diversity in
Indian Languages

Jack FELLMAN, The Role of Language in Forging
National Identity: Arabic in the Middle East

Theodore GUTMANS, L'autonomie culturelle en
pays flamand

Richard E. WOOD, Readings in the Sociology of
Language (Fishman): Recenzo

Werner BORMANN, Die linguistische Struktur
Europas — Vergangenheit, Gegenwart, Zukunft
(Décsy): Recenzo

Erich-Dieter KRAUSE, Esperanto-russkij Slovar'
(Bokarëv): Recenzo

*Plus: aktualaj notoj kaj ampleksaj resumoj de ĉiuj
artikoloj en la Internacia Lingvo Esperanto*

*Ankoraŭ mendeblaj estas la volumoj 1, 3 kaj 4 kaj la
unuopaj numeroj 4 kaj 5. (La numero 6 estas jam
elĉerpita.) Abonkotizo por unu volumo (3 numeroj)
estas 30, — gld.; unuopa numero kostas 12, — gld.
(por Nederlando respektive 31,20 kaj 12,48 gld.),
inkluzive de la sendokostoj. Mendu ĉe via libroservo
aŭ landa peranto de UEA.*

Eldono de Mouton sub aŭspicio de CED